
# EL POPOLA ĈINIO

中国报道

7
1975






Nova pinto en montaro *(ĉinstila pentraĵo)*

# Varma Celebro de la Unua de Majo





En la alta tajdo de studo de la marksisma teorio pri la diktaturo de la proletaro, la ĉina popolo solene celebras la internacian feston de laboruloj la Unuan de Majo.



Popolkomunumanoj ludas programeron pri lernado de Daĝaj en agrikulturo.


Lernantoj de lernejoj "la 7-a de Majo" ĝoje rigardas modelojn prezentantajn la novan fizionomion de la kamparo.

Dekmil homoj prezentas en la Ĉefurba Sporta Halo la programeron Lernado de la Revoluciaj Modelaj Teatrajoj.





Ĉinaj diversnaciecaj popolanoj ĝoje rigardas programerojn.









Kantado kaj dancado por varme gratuli la sudvjetnaman popolon pro ĝia granda venko de liberigo de Sajgono

Geamikoj el Hindoĉinio kaj aliaj partoj de la tuta mondo ĝoje celebras la Unuan de Majo kune kun pekinaj popolanoj.





Kamboĝaj geamikoj laŭte kantas kune kun membroj de la Popola Komunumo de Ĉina-Kamboĝa Amikeco por varme celebri la grandan venkon de la liberigo de la tuta Kamboĝo.




Avangarduloj de fabrikoj partoprenas en celebra aktivado en parko.



Elmigrintaj samlandanoj de Tajvan-provinco ĝoje celebras la Unuan de Majo kune kun la popolo de la patrolando en Pekino.

Laboristinoj prezentas dancon pri sopiro al la samlandanoj de Tajvan.



# Ni restos ĉiam kune

LAŬ invito de la Centra Komitato de Komunista Partio de Ĉinio kaj la registaro de la Ĉina Popola Respubliko, Prezidanto Kim Il Sen kaj la de li gvidata Partia kaj Registara Delegacio de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio faris oficialan viziton al Ĉinio de la 18-a ĝis la 26-a de aprilo, 1975.

La amikeco inter la ĉina kaj korea popoloj havas profundan radikon kaj estas cementita per sango. La vizito de la Korea Partia kaj Registara Delegacio persone gvidata de Prezidanto Kim Il Sen multe stimulis la ĉinan popolon. La 18-an de aprilo, kiam la koreaj kunbatalantoj atingis Pekinon, ili ricevis solenan kaj varman bonvenigon de centmil popolanoj de nia ĉefurbo. Vespere de la sama tago la Centra Komitato de KPĈ kaj la Ŝtata Konsilantaro aranĝis por ili grandiozan bonvenigan bankedon. La kunbatalantoj de la du landoj ĝoje kunestis kaj kore interparolis. Ili gratulis reciproke pro la grandaj sukcesoj de la du popoloj en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. La koreaj amikoj deziris al la ĉinaj kamaradoj venkon en la liberigo de Tajvan kaj reunuigo de la tuta Ĉinio. Kaj la ĉinaj kamaradoj esprimis sian kredon, ke Koreio ampleksanta trimil liojn certe reunuiĝos kaj la koreaj samlandanoj en la suda kaj norda partoj certe rekuniĝos. Ili esperis, ke la batala amikeco inter la ĉina kaj korea popoloj fariĝos ankoraŭ pli brila en la komuna batalo por la progresaj aferoj de la homaro.

En la mallonga vizitado de ok tagoj, la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong, Prezidanto Ĝu De, Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj aliaj partiaj kaj ŝtataj gvidantoj de nia lando intime intervidiĝis kun Prezidanto Kim Il Sen kaj aliaj honorindaj koreaj gastoj. En varma atmosfero de revolucia amikeco kaj batala solidareco kamarado Deng Hiaŭping, vicprezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro plurfoje faris interparolojn kun Prezidanto Kim Il Sen kaj ili atingis unuecajn opiniojn pri ĉiuj diskutitaj problemoj. Prezidanto Kim Il Sen faris viziton ankaŭ al Pekino kaj Nankino kaj eldiris multajn kuraĝigajn vortojn pri la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de nia popolo. La vizito de Prezidanto Kim Il Sen aldonis novan paĝon en la historio de amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Koreio. Lia zorgo al la ĉina popolo kaj profunda amikeco de la korea popolo alportita de li al nia popolo gravuriĝos por ĉiam en nia koro.

La granda gvidanto de la korea popolo Prezidanto Kim Il Sen estas intima kunbatalanto de la ĉina popolo, kiu lin bone konas kaj respektas. La informo pri la vizito de Prezidanto Kim Il Sen al Ĉinio vekis grandan entuziasmon ĉe la ĉina popolo. En aprilo verdas salikoj en Pekino kaj pompas floroj en suda Ĉinio. Kien ajn iris Prezidanto Kim Il Sen kaj la aliaj honorindaj koreaj gastoj, tie ili ricevis bonvenigon pli kortuŝan ol la bela printempo. La ĝojkrio "Vivu la granda gvi-

danto de la korea popolo Prezidanto Kim II Sen!" sonis de Tian-anmen-portego ĝis la piedo de la monto Ziginŝan. Kiam Prezidanto Kim Il Sen iris pririgardi iujn bazajn unuojn, tie oni ĝoje dancis kaj kantis ambaŭflanke de la vojo por bonvenigi lin kaj ĉie prezentiĝis varmaj scenoj. Dum bonvenigo oni varme parolis pri tio, ke sub la gvido de la Korea Labora Partio estrata de Prezidanto Kim Il Sen, la korea popolo kun senkompara patriota entuziasmo kaj revolucia heroismo la unua venkis armitan agresadon de la usona imperiismo post la Dua Mondmilito kaj starigis brilan ekzemplon por la tutmondaj popoloj en ilia batalo kontraŭ imperiismo, ke sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Kim Il Sen, la korea popolo persistas en la diktaturo de la proletaro kaj la socialisma vojo kaj per rapideco de Ĉonlima akiris brilajn sukcesojn en la socialisma konstruado, ke la Korea Labora Partio kaj la korea registaro kun Prezidanto Kim Il Sen kiel la ĉefo kaj la korea popolo persistas en proleta internaciismo, firme oponas kontraŭ imperiismo kaj moderna reviziismo kaj faris gravan kontribuon al la revoluciaj bataloj de la subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj de la tuta mondo, ke sub la gvido de Prezidanto Kim Il Sen, la korea popolo faras obstinan batalon por efektivigi reunuiĝon de la patrolando kaj ke Prezidanto Kim Il Sen kaj la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong persone kulturis la batalan amikecon kaj revolucian solidarecon de niaj du popoloj. Kiel diris kamarado Kim Dong Giu, membro de la delegacio kaj vicprezidanto de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio en la bonveniga bankedo donita de la Revolucia Komitato de Giangsu-provinco, ke "la senkompare varma bonvenigo de la ĉina popolo estas manifestiĝo de alta respekto kaj fido al la granda gvidanto de la korea popolo kamarado Kim Il Sen."

La ĉina popolo aparte dankas Prezidanton Kim Il Sen, la Korean Laboran Partion kaj la koreajn registaron kaj popolon pro ilia subteno kaj helpo al la socialisma revolucio, socialisma konstruado kaj internacia batalo de nia lando. Dum la vizitado Prezidanto Kim Il Sen montris grandan zorgon al la revolucio kaj konstruado de nia popolo kaj donis intiman kuraĝigon en diversaj lokoj vizitataj. En la 20-a de aprilo, kiam Prezidanto Kim Il Sen vizitis la Popolan Komunumon de Ĉina-Korea Amikeco en la antaŭurbo de Pekino, li persone plantis kune kun ĉinaj kamaradoj tri amikecajn arbidojn en la korto de la komunuma oficejo. Tiuj tri arboj certe sane kreskos kaj prosperos same kiel la amikeco inter la popoloj de niaj du landoj.

La batala kaj frata amikeco inter niaj du popoloj devenas de la komuna historia sorto kaj la komuna batala tasko de niaj du landoj. Ni iam batalis ŝultro ĉe ŝultro kontraŭ agresado de imperiismo kaj gajnis la komunan venkon per sango. Nun ni subtenas kaj kuraĝigas reciproke kaj kune antaŭen marŝas sur la larĝa vojo de socialismo al komunismo. Rememorante pri la pasinteco, ni ĝojas pro la venko, kaj antaŭen rigardante, ni vidas brilan perspektivon. Post alveno al Ĉinio, ĉu en interparoloj dum la vizitado, aŭ en paroladoj en bankedoj, la kunbatalantoj de la du landoj per malsamaj lingvoj esprimis jenan saman senton: La amikeco inter la ĉina kaj korea popoloj estas cementita per sango kaj bazita sur Marksismo-Leninismo kaj proleta internaciismo kaj estas la plej valora amikeco. Kio ajn okazos en la mondo ni ĉiam unuiĝos firme kaj batalos ĝis la fino por nia komuna revolucia afero!

En la 25-a de aprilo, kiam Prezidanto Kim Il Sen revenis al Pekino post vizito al Nankino, li donis en la Popola Halo grandiozan adiaŭan bankedon. La kunbatalantoj de la du landoj refoje ĝoje kunestis en la iluminita bankeda salono. Dum la bankedo revoluciaj kantoj de la du landoj estis ludataj alterne en la salono, kiu estis saturata de ĝojaj interparoloj kaj ridoj. Kiam kamarado Kim Il Sen kaj kamarado Deng Hiaŭping faris respektive toston, foje kaj refoje tondris aplaŭdado. La kunbatalantoj de Ĉinio kaj Koreio esprimis en la bankedo sian fierecon pri la sincera amikeco inter la du popoloj, ĝojon pro venkoj de la revoluciaj bataloj de diverslandaj popoloj

kaj fidon al progresaj aferoj de la homaro. La historia longa rivero torentas seninterrompe kaj la revoluciaj popoloj senĉese ŝanĝas la fizionomion de la mondo per sia brava batalo. Ni firme kredas, ke en tiu granda batalo la ĉina kaj korea popoloj certe antaŭen marŝos ŝultro ĉe ŝultro same kiel antaŭe.

En la 26-a de aprilo, la Korea Partia kaj Registara Delegacio sukcesplene finis la vizitadon al Ĉinio. Kiam Prezidanto Kim Il Sen estis forlasanta Pekinon kun sia delegacio por reveni al la patrolando, la adiaŭantoj formis en la Pekina Fervoja Stacio maron de ruĝaj flagoj, maron de floroj kaj maron de amikeco. Oni ĝojkriis kaj dancis, varme dezirante al Prezidanto Kim Il Sen bonan sanon kaj aklamante la novan paĝon en la historio de la amikeco inter la ĉina kaj korea popoloj. Kiam Prezidanto Kim Il Sen, akompanate de niaj partiaj kaj ŝtataj gvidantoj, trairis la adiaŭantajn amasojn, kaj kore mansalutis al ili ascendinte la trajnon, miloj kaj miloj da manoj svingiĝis al li. Oni sentis bedaŭron pro disiĝo kun la honorindaj koreaj gastoj. La trajno ekmoviĝis, akceliĝis iom post iom kaj rapidis al malproksimo. Ĝi galopos tra la vasta verda tero de norda kaj nordorienta Ĉinio, kie estas fortika postfronto de la korea popolo, kaj morgaŭ ĝi enkuros en la korean montaron kun pompe florantaj rododendroj, kie leviĝas nova alta tajdo de socialisma konstruado. Nun bonega estas la situacio de niaj du landoj. Kiel kunbatalantoj kaj fratoj, niaj du popoloj kune batalos, kune venkos kaj ĉiam staros kune en la estonteco.

# Iri la vojon de sinapogo sur propraj fortoj

## — Pri disvolviĝo de industrio en Ŝanhajo

GJU HINHUA

Ŝanhajo estas la plej granda industria urbo de Ĉinio.

Antaŭ 26 jaroj, kiam la flago de imperiismo super Ŝanhajo estis forblovita de la revolucia ŝtormo de la ĉina popolo, propaganda organo de imperiismo malice diris, ke sen "helpo" de imperiismo Ŝanhajo kaj la aliaj urboj de Ĉinio "surpaŝos teruran vojon", kaj ke "kiam la Kompartio renkontos la rigoran realon de la ŝanhaja vivo", ĝi ŝanĝos sian "linion" kaj turniĝos almozpete al la imperiistoj.

Poste la social-imperiismo rompis en unu nokto ĉiujn interkonsentojn subskribitajn kun Ĉinio kaj revokis ĉiujn siajn specialistojn, intencante, ke la socialisma konstruado de Ĉinio paneos en la sekvanta mateno.

Tamen la historio de la 26 jaroj "rigore" mokis kaj senkompate batis la imperiismon kaj social-imperiismon. Sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kun Prezidanto Maŭ Zedong kiel la ĉefo, la ŝanhaja laboristaro firme plenumis la linion de la Partio kaj diligente kaj ŝpareme faris konstruadon, apogis sin sur propaj fortoj kaj pene batalis kontraŭ malfaciloj, tiel ke la ŝanhaja industrio rapide disvolviĝis. La nuna totala produktovaloro


de la industrio de Ŝanhajo estas duoblo de tiu en 1965 antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj 18-oblo de tiu en 1949.

## REVOLUCIO STIMULIS PRODUKTON

Ĝis 1949 la industrioj de la malnova Ŝanhajo jam havis historion de pli ol 100 jaroj. Sed sub la regado de la reakcia reĝimo ĝi progresis malrapide kaj estis stampita per pezaj koloroj de duonkolonia ekonomio. Gravaj entreprenoj de elektroenergio, gaso, akvo, trafiko k. a. estis regataj de imperiistoj. La industriaj fakoj estis kriplaj. Ĝia peza industrio konsistigis nur 13.6% de ĝia tuta industrio kaj servis nur por munti kaj ripari maŝinojn importitajn el imperiismaj landoj, tute ne havante kapablon de sendependa fabrikado. kvankam la malpeza kaj tekstila industrioj havis certan bazon, tamen plejparto de la ekipaĵoj estis malnovaj, la teknologioj postiĝintaj kaj la laborkondiĉoj malbonaj. La ĉefaj ekipaĵoj, krudaj materialoj kaj hejtaĵoj devis esti importitaj. Tre malalta estis la industria produktiveco.

Post la Liberiĝo de Ŝanhajo oni fondis tie revolucian regpotencon de la proletara diktaturo, forpelis la agresajn fortojn de imperiismo, konfiskis la entreprenojn de burokrata kapitalo kaj starigis ŝtatan ekonomion kun tutpopola posedsistemo de produktaj materialoj. Samtempe oni aplikis la principon de utiligo, limigo kaj transformo rilate al la privataj industrio kaj komerco por laŭplane kaj laŭpaŝe turni la kapitalisman posedsistemon en socialisman. Oni faris socialisman transformon ankaŭ al la individuaj metiistoj, organizante ilin en kooperativojn. Laŭ la principo de "plena utiligo kaj racia disvolvo" Ŝanhajo, post la Liberiĝo, faris serion da reorganizo ekonomia kaj reformo teknologia al la ekzistantaj entreprenoj kaj starigis kaj plivastigis nombron da grandatipaj spinaj entreprenoj, tiel ke la industria aranĝo iom post iom raciiĝis.

Post fundamenta plenumo de la socialisma transformo de posedo de produktaj materialoj, disvolviĝis profundaj socialismaj revoluciaj movadoj en politika kaj ideologia frontoj. Ĉiuj revoluciaj movadoj, precipe la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio forte akcelis la disvolviĝon de la produktaj fortoj.



*Generatoro kun interne farita duobla akva malvarmigo en muntado*

Antaŭ la Liberiĝo, Ŝanhajo povis produkti nur du specojn de ŝtalo kaj 40 specojn de ŝtalaj materialoj de ordinaraj normoj. Sed nun ĝi jam povas produkti pli ol 1,200 specojn de ŝtalo kun aloja kaj bonkvalita ŝtalo kiel la ĉefa produktaĵo kaj ŝtalajn materialojn de ĉirkaŭ 20,000 normoj. Nun la produktokvanto de ŝtalo de la tuta urbo en duontago egalas la totalan produktokvanton de la tuta jaro 1949.


Livero de grandatipaj elektronikaj komputeroj kaj elektronikaj mikroskopoj bezonataj en nia ekonomia kaj nacidefenda konstruado kaj scienca esplorado estis longtempe blokadita de imperiismo kontraŭ Ĉinio. Nun elektronika komputero de integra cirkvito kun operacio de 1,000,000 fojoj po sekundo kaj 400,000-obla elektronika mikroskopo jam naskiĝis en Ŝanhajo.

Antaŭ la Liberiĝo eĉ ŝraŭbo uzata en elektroproduktado devis esti importita. Sed nun Ŝanhajo jam povas produkti grandan generatoron kun interne farita duobla akva malvarmigo kaj kompletajn ekipaĵojn por metalurgio, laminatado kaj rafinado de petrolo, kaj iuj el ili povas esti eksportitaj.

En la pasintaj 26 jaroj, Ŝanhajo fondis per siaj propraj fortoj pli ol 40 novajn industriajn fakojn de metala materialo, traktoroj, aŭtoj, kemia sterko, insekticidoj, petrolaĵoj, peztipaj maŝinoj, precizaj ilmaŝinoj, ekipaĵoj por elektrostacio, brakhorloĝoj, fotografiloj, televidiloj, kemiaj fibroj, elektronikaj aparat-elementoj kaj elektronikaj ekipaĵoj. La proporcio de ĝia peza industrio en ĉiuj industrioj leviĝis ĝis ĉirkaŭ 54% en 1974. Nun Ŝanhajo jam fariĝis sinteza industria kaj scienca-teknika bazo kun kompare kompletaj produktaj fakoj en la nova socialisma Ĉinio.

## KREIVO DE AMASOJ

La laboristaro kaj vastaj amasoj de Ŝanhajo rompis la blokadon de imperiismo, eltenis la premon de la social-imperiismo kaj akiris sukcesojn unu post alia en la konstruado. El tio ili profunde komprenis, ke por disvolvi la socialisman industrion oni nepre devas persisti en la principo de sendependeco, memdecido kaj sinapogo sur propraj fortoj. Frue en la militaj jaroj Prezidanto Maŭ jam klare montris: **"Ni pledas por sinapogo sur propraj fortoj. Ni esperas ricevi eksterajn helpojn, sed ni ne devas dependi de ili. Ni apogas nin sur niaj propraj klopodoj kaj sur la kreivo de nia tuta armeo kaj nia tuta popolo."**



*La unua ŝipo por mara geologia prospektorado konstruita de Ŝanhajo*


Ni rigardu kiel la ŝanhajaj laboristoj disvolvas sian kreivon!

Veterana laboristo Hju Joŭmu estas unu el la fondintoj de la brakhorloĝa industrio de Ŝanhajo. En 1955, li kaj liaj kolegoj mane faris horloĝajn pecetojn per fajliloj kaj tiel elfaris la unuan brakhorloĝon de Ŝanhajo. Sed ĝi povis funkcii nur sur tablo, kaj haltis sur brako. Iuj mokis, ke ĝi estas tablohorloĝo kaj ne brakhorloĝo. Sed la laboristoj aplaŭ-

dis ĝin. Ili diris, ke kvankam ĝia kvalito estas nebona, tamen ĝi estas farita per niaj propraj fortoj; ke produktinte tiun nenorman horloĝon ili certe povos fari la duan horloĝon norman kaj poste pli multajn bonajn brakhorloĝojn. Fakto ĝuste estis tia. Nun brakhorloĝoj kun marko "Ŝanhajo" havas grandan debiton en la tuta lando kaj krome aldoniĝis novaj produktaĵoj kiel aŭtomata kaj subakva aŭtomata brakhorloĝoj kun kalendaro.

Veterana laboristo Ŝaŭ Pugen estas atestanto de la historio de aŭtoindustrio de Ŝanhajo. Antaŭ la Liberiĝo, sur stratoj de Ŝanhajo veturis nur aŭtoj importitaj el diversaj landoj sed neniu fabrikita de Ĉinio mem. En 1958, la jaro de la granda antaŭensalto, la ŝanhajaj laboristoj komencis produkti aŭtojn. La traboj de la unua aŭto kun ŝarĝkapablo de 4 tunoj estis prilaboritaj de Ŝaŭ Pugen kaj aliaj laboristoj per 24-funta martelo. Por fabriki la unuan triradan aŭton oni faris ĝiajn trabojn el ligno kaj prenis bambulatojn kiel risortojn. Iuj rigardis ĝin ne aŭto, tamen laboristoj parade stiris ĝin ĉien en la urbo tamburante kaj tamtamante por proklami ĝian naskiĝon. Ĝuste sur tia bazo disvolviĝis la aŭta industrio de Ŝanhajo. Nun Ŝanhajo pogrande produktas grandajn baskulkamionojn, pasaĝerajn aŭtomobilojn, aŭtobusojn, ĵipojn kaj aliajn sume pli ol dek specojn de aŭtoj.

*Traktoroj kun marko Ŝanhajo atendas transporton.*



En la Granda Proleta Kultura Revolucio, la laboristoj kritikis la reviziisman linion, blindan adoron al fremdlandaĵoj kaj rampismon kaj plie disvolvis la spiriton de sendependeco, memdecido kaj sinapogo sur propraj fortoj, tiel ke la ŝipkonstrua industrio havis pli grandan disvolviĝon. En la 17 jaroj antaŭ la granda kultura revolucio en Ŝanhajo nur unu fabriko fabrikis unu dekmil-tonelan ŝipon. Nun tiajn ŝipojn kaj dizelojn kun dekmil ĉevalpovoj povas fabriki ne nur specialaj ŝipkonstruejoj sed ankaŭ fabrikoj kun malbonaj kondiĉoj kaj kun ŝipriparado kiel sia ĉefa tasko. De la komenco de la kultura revolucio en 1966 ĝis la fino de la jaro 1974 Ŝanhajo liveris al la ŝtato 32 dekmil-tonelajn ŝipojn, inter kiuj 12 estis liveritaj en 1974.

Dank' al plia elvolvo de amasa kreivo la nombro de poliesteraj tekstilaj kaj tinkturaj fabrikoj de Ŝanhajo fonditaj per kompare malmulta investo plimultiĝis de 13 antaŭ la granda kultura revolucio ĝis 41 kaj la produktokvanto de poliestera ŝtofo 23-obliĝis.

Dank' al plia elvolviĝo de amasa kreivo la amasa movado de teknika renovigo de Ŝanhajo disvolviĝis pli vigle. Laŭ nekompleta statistiko de 7 ĉefaj industriaj burooj, en 1974 estis efektivigitaj sume pli ol tridek mil teknikaj renovigoj, kiuj ampleksas reformojn de procedoj kaj de tuta teknologio, reformojn


de maŝinpecoj kaj de tuta ekipaĵo, mekanikigon kaj aŭtomatigon de unu procedo kaj formon de produkta linio, teknikajn renovigojn de unu fabriko kaj de tuta industria branĉo. Tio forte puŝis la grandmezuran kreskon de la industria produktado de tiu urbo.

### VASTA SOCIALISMA KUNLABORO

Iri la vojon de sinapogo sur propraj fortoj ne signifas ke ĉio bezonata en fabriko devas esti farita de la fabriko mem. Kontraŭe, ĉar Ĉinio estas socialisma lando, la celo de ĉiuj industriaj branĉoj estas la sama, oni povas, sub la unueca gvido de la Partio, vaste disvolvi socialisman kunlaboron, organizante kelkajn, dekkelkajn aŭ kelkcent fabrikojn en novan potencan produktan forton por bone kaj rapide plenumi taskon neplenumeblan de unu fabriko aŭ fako.

La ŝanhaja industrio atingis rimarkindan sukceson en tiu flanko. En 1970 la ŝtato urĝe bezonis novan alojan materialon. Se la tasko estus asignita al unu fabriko, oni devus konstrui novan laborejon per 60,000,000 juanoj en tri jaroj. Ŝanhajo organizis 6 mezajn kaj malgrandajn fabrikojn por kunlabori. Rezulte el tio, ili elfaris specimenon en dudek tagoj kaj post du monatoj jam komencis pograndan produkton konsuminte sume nur kelkcent mil juanojn.

Por fondi kaj disvolvi modernan elektronikan industrion la ŝanhajaj laboristoj proponis fari solkristalan silician fornon en 15 tagoj. Ŝanhajo iam importis unu tian ekipaĵon, kiu povas enteni ĉiufoje nur 200 gramojn da materialo. Kiam oni povus fondi modernan elektronikan industrion, se ni kroĉus nin al importado de ekipaĵoj? La ŝanhajaj laboristoj decidis kunlabori por mem fari tian ekipaĵon. Tiam iuj homoj, kiuj ne vidis la grandan forton de la socialisma kunlaboro, diris: "Eĉ dioj ne povas fari ĝin en 15 tagoj!" Tamen kunlaborante unuanime dekkelkaj unuoj elfaris ĝin nur en 13 tagoj. Poste en tri monatoj ili fabrikis 50 solkristalajn siliciajn fornojn. La produktivo de ĉiu el ili multe superis tiun



*Elektraj aparatoj faritaj de fabriketo funkciigata de dommastrinoj*

de la importita. Nun Ŝanhajo jam produktis multajn elektronikajn komputerojn, televidilojn kaj elektronikajn medicinajn aparatojn.

La disvolviĝo de la ŝanhaja industrio ricevis grandan helpon de la tuta lando. Ankaŭ la ŝanhajaj laboristoj montris noblan grandaniman zorgon pri la tuta afero en la socialisma kunlaboro. La laboristoj de la Fabriko de Neregulaj Ŝtaltuboj postulis siajn gvidantojn starigi regulon ke kiel ajn malfacila estas la postulo de bezonantoj, neniu rajtas ĝin rifuzi sen konsento de la laboristoj. De la granda kultura revolucio la nomita fabriko produktis pli ol mil specojn de diversformaj ŝtaltuboj por Ŝanhajo kaj aliaj lokoj de la tuta lando. Inter la produktaĵoj de la fabriko troviĝas tubo tiel granda, kiun aŭtomobilo povas traveturi, kaj tubo tiel malgranda, kiu pezas nur unu gramon. Por fari tian malgrandan ŝtaltubon la laboristoj de la fabriko eksperimentis pli ol 400 fojojn en du jaroj.

Ŝanhajo estas miniaturo de Ĉinio en la socialisma konstruado. La grandnombraj konstruaj sukcesoj de Ŝanhajo kaj la tuta lando elokvente pruvis, ke la vojo de sendependeco, memdecido kaj sinapogo sur propraj fortoj estas unika vojo kondukanta de venko al venko por la disvolviĝantaj landoj kiel Ĉinio.

# La ŝanhaja haveno en antaŭenmarŝo

SUR Huangpu-rivero aliras kaj foriras senĉese oceanaj varŝipoj de ni mem konstruitaj kaj fremdlandaj venintaj de diversaj lokoj de la mondo. En la dokoj levaparatoj svingadas siajn longajn brakojn kaj la nove konstruitaj staploj staras unuj apud aliaj kiel kombildentoj. La sonoj de sirenoj de la ŝipoj, la bruoj de la mekanikaĵoj, la ordonfajfoj de dokistoj . . . kune formis viglan simfonion de la haveno longa je dekoj da kilometroj. Ĉi tie estas Ŝanhajo, la plej granda internacia haveno de Ĉinio.

## ĜISFUNDA ŜANĜIĜO

Ŝanhajo situas ĉe la enfluejo de la plej granda ĉina rivero Jangzi kaj en la mezo de nia longa marbordo. Ĝi estas orienta pordo de Ĉinio kontraŭ la maro.

La haveno neniam glaciiĝas pro ĝia situo en la mezvarma zono. La rivero estas larĝa kaj la ĉefa navigvojo estas profunda. La haveno ligiĝas kun vasta regiono per facila trafiko. Tial, frue jam en la komenco de la 16-a jarcento ĉi tie disvolviĝis surakva transportado.

Pro la favoraj geografia situo kaj naturaj kondiĉoj imperiistoj tre avidis la havenon. Post la Unua Opia Milito de 1840, imperiistoj jam devigis la registaron de King-dinastio malfermi Ŝanhajon kiel unu el la komercaj havenoj. De tiam la suvereneco de la haveno estis kaptita de imperiistoj. Ili perforte okupis teron ambaŭborde de Huangpu-rivero kaj tie konstruis dokojn kaj staplojn. Imperiismaj ŝipoj militaj kaj komercaj kuradis en la rivero senbride kaj arogante. Tra la haveno ili enportis en Ĉinion opion kaj superfluajn varojn por veneni kaj ekspluati la ĉinan popolon, enportis armilojn kaj municion por masakri niajn popolanojn, kaj forrabis de Ĉinio gigantajn kvantojn da malmultekostaj minaĵoj, agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj. La haveno de Ŝanhajo fariĝis salttabulo por la imperiistoj en ilia milita, politika, ekonomia kaj kultura agresado al Ĉinio.

En la longaj obskuraj jaroj antaŭ la Liberiĝo, por ĉasi profiton, la imperiistoj kaj kapitalistoj tute ne zorgis pri la vivo de laboristoj. Tiam la ŝanhaja haveno havis nur 41 grandajn kaj malgrandajn maŝinojn kaj ilia plejparto estis neuzata. Ĉiujare tra la haveno pasis milionoj da tunoj da varoj, ŝarĝitaj kaj malŝarĝitaj preskaŭ tute per homa forto. Kiom da dokistoj mortis pro la laciga laborado, la mizera vivo kaj la kruela torturado de laborestroj!

La venko de la ĉina revolucio en 1949 donis finon al la regado de la imperiistoj kaj kuomintangaj reakciuloj kaj la haveno komencis sian novan historion.

Nelonge post la Liberiĝo la Partio kaj la popola registaro jam starigis Ŝanhajan Administracion pri Havenaj Aferoj por unuece pri-

zorgi la havenajn aferojn kaj gvidis la laboristojn en laŭplana rekonstruado de la haveno. Oni malkonstruis la palisarojn kaj ĉirkaŭmurojn uzatajn por protekti privatan proprietecon. Cetere oni plenigis kanaletojn, pavimis novajn vojojn kaj transformis la dokojn en unu tuton. Oni dragis naviglinion, plimultigis navigsignalojn kaj senĉese altigis la navigeblecon de Huangpu-rivero por grandaj kargoŝipoj.

Rekonstruante la malnovajn dokojn, oni konstruis multajn modernajn dokojn. En 1959, ĉe la senhoma malsupra parto de Huangpu-rivero laboristoj konstruis en malpli ol 10 monatoj ferbetonan dokon de akva kaj tervoja kontinua trafikado, kiu povas samtempe akcepti 6 super-dekmil-tonelajn ŝipojn. Oni etendis fervojon ĝis la kajoj, tiel ke oni povas rekte transŝarĝi kargon. Antaŭ nelonge ĉi tie oni konstruis du gigantajn staplojn, en kiuj povas libere veturi kamionoj.

En la Granda Proleta Kultura Revolucio la konstruado de la haveno plirapidiĝis. En la 108 jaroj, de kiam Ŝanhajo estis malfermita al fremdlandoj, ĝis la Liberiĝo, la totala longeco de la varfoj ambaŭborde de la rivero estis nur 6.3 km. Sed en la pli ol 20 jaroj post la Liberiĝo nur tiu de rekonstruitaj kaj nove konstruitaj ferbetonaj kajoj por super-dekmil-tonelaj ŝipoj jam superis 20 km, kaj el tiuj duono estis farita en la ok jaroj ekde la Granda Proleta Kultura Revolucio.


La hodiaŭa Ŝanhajo estas grava centro de produktaĵoj por la urboj kaj kamparo de Ĉinio kaj unu el la ĉefaj havenoj por eksterlanda komerco. Pli ol 100 landoj kaj regionoj havas kun la haveno komercan rilaton. Senĉese aliras kaj foriras oceanaj ŝipoj plenŝarĝitaj per industriaj kaj agrikulturaj produktaĵoj de Ĉinio aŭ aliaj landoj. Pere de la haveno pli firmiĝas la amikeco inter la ĉina popolo kaj la aliaj popoloj de la mondo.

## MEĤANIZADO

Per konstruado la haveno de Ŝanhajo ŝanĝis sian pasintan postiĝintan aspekton. Ekde 1966 la haveno levis novan tajdon de amasa teknika renovigo kaj marŝas al aŭtomatizo kaj kontinuigo de ŝarĝo kaj malŝarĝo.

La 6-a laborsekcio estas doko por malŝarĝi karbon. En 1973 dokistoj konstruis ĉi tie malŝarĝan tobogano. Ĝi longas 1,000 metrojn, altas 10 metrojn kaj ĉiujare povas transporti 3,600,000 tunojn da karbo. Nun por transporti karbon laboristoj nur bezonas sidi en la regadejo kaj premi prembutonon.

*Parto de la ŝanhaja haveno*





*Ĉina piloto gvidas fremdlandan ŝipon en la ŝanhajan havenon.*

La konstruado bezonis multan laboradon, altan teknikan nivelon, spertajn teknikistojn kaj nombron da maŝinoj. Sed tiam la ekzistantaj kondiĉoj ne povis tute kontentigi la bezonon. Tial iuj opiniis ke la konstruado estas neefektivigebla.

La partia komitato de la sekcio gvidis la amasojn en studo de la instruo de Prezidanto Maŭ: **"La sociaj riĉaĵoj estas kreitaj de laboristoj, kamparanoj kaj laborantaj intelektuloj. Ĉiu ajn malfacilo en la mondo povas esti solvita, se nur tiuj homoj mastras sian sorton, havas marksisman-leninisman linion kaj aktive solvas la demandojn, sed ne ĉirkaŭiras ilin."** Post la studo ĉiuj havis pli firman memfidon kaj decidis krei bezonatajn kondiĉojn por ŝanĝi la fizionomion de la haveno.

Sub la gvido de la partia komitato, plene mobiliziĝis la amasoj. La dokistoj lernis teknikon de ferbetonado kaj bonkvalite finis la taskon. Dum fabrikado de karba ŝutmaŝino, pro manko de ilmaŝino oni prilaboris maŝinpecojn per fajliloj. Ankaŭ la kuiristoj kaj oficistoj partoprenis en laborado dum liberaj horoj. Ili venkis plurajn malfacilojn kaj sukcese finis la konstruadon helpe de frataj unuoj.

Por plirapidigi la transportadon de loza greno, la laboristoj de la 2-a sekcio de la haveno projektis kaj konstruis sistemon por kontinua transportado de loza greno, helpe de diversaj entreprenoj de Ŝanhajo. Sur la kajo staras alta ponta grensuĉa maŝino kaj 100 metrojn fore de la rivero estas 18 altaj insilujoj, kiuj povas enteni 40,000 tunojn da loza greno. Inter la suĉilo kaj insilujoj funkcias grandaj toboganoj kaj ĉe la enirejoj de la insilujoj oni instalis elektronikajn pesilojn. De la enportado de greno en la insilujojn ĝis la pakado kaj elportado, ĉiuj laboroj estas aŭtomate plenumataj, kio multe reduktis la laborintenson de laboristoj.

Nun en la haveno tiaj aŭtomataj kaj kontinuaj ŝarĝ-malŝarĝaj ekipaĵoj estas plane konstruataj. Dank' al la entuziasmo de laboristoj kaj vasta apliko de mekanikaĵoj la laborefikeco pligrandiĝas jaron post jaro. En 1974, la kvanto de trapasigitaj varoj tra la haveno en unu monato superis 11-oblon de tiu de unu jaro tuj post la Liberiĝo.

## MASTROJ DE LA HAVENO

Ŝanĝiĝis la haveno, tamen la plej granda kaj emocia ŝanĝiĝo estas tiu de ĝiaj laboristoj. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio ili liberiĝis de zorgoj pri senlaboreco kaj eksigo, kaj forskuis la mizeron. Ili, la kulioj generacion post generacio subpremataj kaj ekspluatataj en la malnova socio, fariĝis mastroj de la socialisma haveno. Hodiaŭ, ĉu en la transporta laboro aŭ en gvidado de la haveno ili ludas gravan rolon.

Pilotado, rigardata kiel malfacila tekniko, antaŭ la Liberiĝo estis regata kaj monopolata de imperiismaj landoj. La tiamaj pilotoj de la haveno estis proponitaj kaj nomumitaj de fremdlandaj konsuloj al Ŝanhajo. Inter la pilotoj troviĝis neniu ĉina laboristo, kaj eĉ ĉinaj teknikistoj el altaj lernejoj estis ege malmultaj.


Post la Liberiĝo, la partia komitato de la haveno donis apartan atenton en kulturo de laboristaj pilotoj. En la Granda Impeto en 1958, precipe de post la komenco de la granda kultura revolucio, la Partio ofte sendis ordinarajn maristojn al lerno de pilotado. La nunaj pilotoj plejparte estas laboristoj. 40-jara piloto Ĝang Deĵun estis ordinara ŝipisto de iu trenŝipo antaŭ 1960. En majo de tiu jaro la partia organizo sendis lin lerni pilotadon. Dank' al sia diligenteco li rapide mastris la teknikon. En la pasintaj 11 jaroj li pilotis tute sekure pli ol 2,300 ŝipo-fojojn, per kio li gajnis honoron por la socialisma patrolando.

En la gvidantaroj de diversaj niveloj de la haveno senĉese plimultiĝas kadroj devenantaj de laboristoj. En la lastaj jaroj pli ol 800 laboristoj estis promociitaj al diversaj gvidaj postenoj. Maljuna laboristo Meng Zenglin, kiu laboris kun sia patro en la malnova socio kiel ĵinrikŝisto kaj taglaboristo en la haveno, nun estas vicsekretario de la Partia Komitato de la 2-a laborsekcio, membro de la partia komitato de la Administracio de Havenaj Aferoj, membro de la ŝanhaja partia komitato kaj reprezentanto de la 9-a kaj 10-a tutlandaj kongresoj de KPĈ. Li ofte laboras kune kun laboristoj por koni iliajn sentojn, postulojn kaj dezirojn. Cetere, li ofte transdonas kritikojn kaj proponojn de la amasoj al gvidantaj organoj. Li akurate transinformas la amasojn pri la principoj, politikoj kaj rezolucioj de CK de KPĈ kaj de la ŝanhaja partia komitato por eduki kaj mobilizi la amasojn. Laboristoj laŭdis lin: "Li rilatas kun ni ankoraŭ kiel fratoj, malgraŭ ke li fariĝis gvidanto."

Post la granda kultura revolucio, en la haveno aperis multaj novaj gvidantoj kiel Meng Zenglin. Ĝuste pere de ili la Partio kunliĝiĝas kun la dekmiloj da ŝanhajaj havenaj laboristoj en la socialismaj revolucio kaj konstruado.


Hardite en la kultura revolucio ankaŭ la penso de laboristoj ŝanĝiĝis profunde. Ili aktive partoprenis en administrado de entreprenoj.

*La peza laboro de dokistoj de la malnova Ĉinio (sube dekstre) estas farata per maŝinoj.*



En la unuaj tagoj de printempo de 1974, ŝarĝistoj de la 5-a laborsekcio publikigis dazibaŭon kun la titolo "Estu mastroj de la haveno, sed ne sklavoj de tunoj" por kritiki gvidantojn.

Tia estis la afero: Antaŭ la granda kultura revolucio la laborsekcioj sub la influo de



la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki stimulis la aktivecon de laboristoj ĉefe per premioj. Tio ne nur detruis la solidarecon de laboristoj, sed ankaŭ koruptis ilian penson. En la granda kultura revolucio laboristoj kritikis "materian stimulon", "premiojn en komando" k.s. Sed nun la gvidantoj de la 5-a laborsekcio ne donis atenton al edukado de laboristoj per socialisma penso, kaj zorgis nur pri laborkvanto. Kiu finplenumis la taskon, tiu estis laŭdata kaj povis pli frue hejmenreveni. Tio estis esence alia formo de "premioj en komando". Multaj laboristoj malaprobis la faron de la gvidantoj opiniante tion malkonforma al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Juna ŝarĝisto Fang Tianĵen resumis opiniojn de la laboristoj kaj kuraĝe skribis la dazibaŭon. En la dazibaŭon laboristoj diris: "Laborante en la haveno, ni devas zorgi ne nur pri la transporta kvanto, sed ankaŭ pri la linio."

La partia komitato de la 5-a laborsekcio serioze diskutis la dazibaŭon, akceptis la kritikon de la laboristoj kaj mobilizis ilin al pliapaŝa malkovro de problemoj en administrado de la haveno. Ne longe post tio la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio envolvis la tutan landon. La organo de CK de KPĈ *La Popola Ĵurnalo* publikigis la dazibaŭon, kio pli stimulis la socialisman entuziasmon de la havenaj laboristoj.

Sub la gvido de la partiaj organizoj de diversaj niveloj, la havenaj laboristoj profunde kritikis Lin Biaŭ kaj Konfucion kaj forbalais ĉiajn reviziismajn malpuraĵojn, alte tenante la flagon de revolucia kritiko. "Estu mastroj de la haveno" fariĝis komuna devizo de la laboristoj. Ĝi stimulas la laboristojn en sekura, sendifekta, multa kaj rapida ŝarĝ-malŝarĝado por plirapidigi la socialisman konstruadon kaj plenumi internacian devon. La tuta haveno troviĝas en vigla prospero.

En la lastaj dudekkelkaj jaroj, sub la gvido de la Partio, la havenaj laboristoj ĝisfunde ŝanĝis la fizionomion de la haveno per siaj propraj fortoj. Nun la haveno faras novan grandan paŝon en realigo de grandioza perspektiva plano. Estas kredeble, ke en nemalproksima estonteco la haveno akceptos amikojn venintajn de diversaj lokoj de la mondo per ankoraŭ pli bela aspekto.



*Dokistoj kaj ekspedistoj interkonsiliĝas por plibonigi la ŝarĝon kaj malŝarĝon.*

ŜEN LI:

# Nova vojo de produktado de trikitaj lanvestoj

ENIRINTE la laborejojn de la Oka Ŝanhaja Fabriko de Trikitaj Lanvestoj oni vidas: La koloraj lampoj sur la nove almuntitaj elektronikaj regadkestoj de la pli ol 200 malnovaj trikmaŝinoj scintilas alterne indikante glatan funkciadon de tiuj duonaŭtomatigitaj maŝinoj. Laŭ la komponitaj programoj la maŝinoj trikas belkolorajn lanajn vestopecojn. En iu laborejo atenton altiras al si elektronika komputero: Ĉiun sekundon ĝi donas ĉirkaŭ 10,000 signalojn por direkti la funkciadon de la dekkelkaj aŭtomataj trikmaŝinoj laŭ iliaj propraj procedoj. La dek komplikaj procedoj de trikado estas aŭtomate plenumataj sub la regado de la elektronika komputero. Tiu ĉi eksperimenta laborejo de aŭtomataj horizontalaj trikmaŝinoj regataj de unu elektronika komputero estas starigita per kunlaboro de la Ŝanhaja 13-a Radioaparata Fabriko kaj aliaj pli ol 20 fabrikoj en la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio.

En la komenca periodo post la Liberiĝo la lanvestaj trikmaŝinoj de Ŝanhajo estis manipulataj per manoj. La laboristoj mem plurfoje renovigis tiujn malnovajn maŝinojn kaj nun la tuta branĉo de trikitaj lanvestoj jam aŭtomatigis aŭ duonaŭtomatigis la produktadon. La Oka Ŝanhaja Fabriko de Trikitaj Lanvestoj estas unu el la fabrikoj akirintaj pli rimarkindajn sukcesojn en la teknika renovigo. La fabriko malgranda estas en ordinaraj loĝdomoj kun centoj da laboristoj. En 1958, instigate de la ĝenerala linio "streĉi plene la energion, strebi forte antaŭen, por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie", la laboristoj de tiu ĉi fabriko same kiel aliaj fabrikoj reformis la horizontalajn trikmaŝinojn elektrizinte ilin. La Granda Proleta Kultura Revolucio forte akcelis la teknikan renovigon. La laboristoj de tiu fabriko sukcesis en prova farado de trikmaŝino de cifera programa regado. Poste ili komencis reformi la maŝinojn por ke grupo de ili estu regata de unu elektronika komputero.

Estis la lasta tagdeko de oktobro de 1973. En la nomita fabriko iris varma diskutado pri la problemo: Ĉiuj maŝinoj jam estis unuope regataj de elektronika aparato, kion do oni devas fari post tio? Laboristoj proponis, ke unu "elektronika cerbo" direktu plurajn maŝinojn kaj oni konstruu eksperimentan laborejon. Tiam iuj opiniis, ke la kondiĉoj de la fabriko estas nebonaj, ke oni ne devas haste komenci tian grandskalan renovigon, kaj ke oni nur devas fari specimenan maŝinon en la unua jaro, plibonigi ĝin en la dua jaro kaj disvastigi ĝin en la tria.

La partia organizo de la fabriko vidis, ke por fondi eksperimentan laborejon de trikmaŝinoj plurope regataj de elektronika komputero oni ne nur devas solvi komplikan teknikan problemon, sed ankaŭ ekzistas en tio akra ideologia batalo. Ĝi organizis la amasojn al pli profunda kritiko kontraŭ la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ, kaj forigis la influojn de blinda adoro al fremdlandaĵoj, de rampismo kaj aliaj eraraj pensoj. Laboristoj diris: "Por konformigi la produktadon al la disvolvo de la socialisma konstruado de





*Eksperimenta laborejo de trikmaŝinoj plurope regataj de elektronika komputero*

nia lando kaj al la ĉiam pli kreskanta bezono de la popolo, ni devas venki ĉiajn malfacilojn por kiel eble plej rapide sukcesi en starigo de laborejo de trikmaŝinoj plurope regataj de elektronika komputero, sed ne atendi aŭ rampi limake."

Por starigi tian laborejon oni unue devis fari vastan reformon al pli ol 10 horizontalaj trikmaŝinoj kaj aŭtomatigi ĉiujn 10 procedojn de la maŝinoj. Tio vere estis malfacila por la fabriko kun malalta teknika nivelo. Sed la laboristoj prenis la verkon de Prezidanto Maŭ *Pri Praktiko* kiel armilon kaj firme kredis la veron, ke vera scio originas de praktikado. Kuraĝigate de la sukcesoj en la pasintaj reformoj, ili komencis la laboron kun plena memfido.

La tasko fari horizontalan trikmaŝinon kun 10 aŭtomataj procedoj estis asignita al 6 laboristoj de teknikrenoviga grupo de la motora laborejo. Ili ne havis pretajn desegnojn, kaj devis mem palpi vojon. Sed fine ili sukcesis elfari specimenan trikmaŝinon konforman al la postulo de aŭtomata produktado.

Post sukceso de la specimena maŝino oni devis reformi la restantajn maŝinojn en mallonga tempo. Tio ne estis facila. Sed laboristoj diris: "Se la malfacilo estus ŝtono, ni do estu martelo. La martelo certe dispecigos la ŝtonon." "Ni nepre reformos la maŝinojn akurate, eĉ se ni malgrasiĝos pro laborego." Ili faris bluajn desegnojn laŭ la modela maŝino kaj faris pli ol 6,000 maŝinpecojn. Laboristoj de aliaj laborejoj venis por helpi. La tuta fabriko laboris unuanime kaj venkis la malfacilojn unu post alia.

Kiam la Oka Ŝanhaja Fabriko de Trikitaj Lanvestoj laboris en granda entuziasmo por reformi la horizontalajn trikmaŝinojn, ankaŭ aliaj pli ol 20 frataj fabrikoj streĉe laboris por helpi ĝin: La Ŝanhaja 13-a Radioaparata Fabriko elfaris la "elektronikan cerbon" en mallonga tempo; la Dua Fabriko de Maŝinpecoj de Lana-Lina Tekstilado kaj la Ŝanhaja Fabriko de Tekstilaj Motoroj meminiciate fabrikis kaj antaŭdate alportis transmisilojn bezonatajn de trikmaŝinoj. Dum la muntado la aliaj fabrikoj de trikitaj lanvestoj de Ŝanhajo alsendis laboristojn por helpi.

Post klopodado de 100 tagoj fondiĝis la unua eksperimenta laborejo de aŭtomataj lanvestaj horizontalaj trikmaŝinoj de nia lando. Tio estas alia frukto akirita laŭ la principo de sinapogo sur propraj fortoj. Dum la funkciado de pli ol unu jaro laboristoj senĉese plibonigis la maŝinojn kaj perfektigis la novan teknikon. La apliko de elektroniko malfermis novan vojon por la lanvesta produktado de nia lando.

ĴEN MING:

# En daŭrigo de la revolucio

— Notoj pri avangardaj aktivadoj de la kadroj de Hipu-brigado

ANTAŬ 20 jaroj, 23 malriĉkamparanaj familioj de Zunhua-gubernio de Hebej-provinco fondis sub la gvido de Vang Guofan agrikulturan produktan kooperativon, kiu estis nomata "Kooperativo de Senhavuloj" pro manko de plugaj brutoj kaj agrikulturiloj. Ilia spirito de penema ekspluatado de virga tero sur montodeklivoj kortuŝis iujn vizitantojn ĝis larmoj kaj ilia kolektivo estis honore nomata de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong **"figuro de nia tuta lando".** En la pasintaj 20 jaroj, sub la direktado de la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ, grandaj ŝanĝiĝoj okazis al Hipu-brigado de Gianming-komunumo kun Vang Guofan kiel la gvidanto. Modernaj agrikulturaj maŝinoj estas pli kaj pli vaste aplikataj, pinoj, cipresoj kaj fruktaj arboj kovras antaŭe kalvajn montetojn, kaj la pasinta sterila tero fariĝis stabile altproduktaj kampoj. En tiaj kondiĉoj la kadroj de tiu brigado tamen ankoraŭ tenas la spiriton de "senhavuloj" montritan dum la fondo de la kooperativo kaj plie disvolvas la revolucian tradicion de amo al la kolektivo, nekorupteblеco kaj aktiveco en laboro.

## KIAL ILI NE DEGENERIS?

Vizitantoj al Hipu-brigado ofte prezentis jenan demandon: Kial la kadroj de tiu brigado povas ĉiam teni la bonan tradicion de la proletaro? La kadroj respondis: "Por teni la bonan tradicion, oni devas koni la kaŭzon de degenerado."

Post la kolektivigo Hipu-brigado spertis plurajn politikajn batalojn, precipe post la Gran-



*Vang Guofan kun komunumanoj*

da Proleta Kultura Revolucio kaj la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la kadroj de la partia filio kaj la brigado iom post iom formis al si novajn kutimon kaj stilon kombini teorion kun praktiko, studi teorion, fari analizadon kaj resumi sperton. Dum la studo de *La Manifesto de Komunista Partio*, *Ŝtato kaj Revolucio*, *Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo* kaj aliaj verkoj de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kaj aliaj verkoj de Prezidanto Maŭ, ili plurfoje analizis siajn malfortajn punktojn kaj per tio altigis sian konscion pri daŭrigo de la revolucio. Inter la malriĉkamparanoj de la 23 familioj kiuj fondis la kooperativon troviĝis orfo nomata Daj Cun. Antaŭ la Liberiĝo lia familio havis nek domon nek teron kaj vivtenis sin per almozpetado. En la agrara reformo liaj gepatroj ricevis teron kaj domon, sed mortis post nelonge. La 13-jara Daj Cun devigite lombardis la ricevitajn domon kaj teron pro sia senkapableco en terkulturado. Ĝuste tiam Prezidanto Maŭ montris la kolektivan vojon al la vastaj kamparanaj amasoj kaj refoje savis Daj Cun. Li aniĝis al la "Kooperativo de Senhavuloj". Poste la kolektiva ekonomio disvolviĝis, la vivo de

*Vang Ŝun laboras sur kampo.*



Daj Cun boniĝis kaj li fariĝis kadro. Iu malbonulo flatis lin dirante, ke li fariĝis kadro, do "senhavulo" jam povas fariĝi "multhavulo". Post nelonge Daj Cun uzis ĉaron kaj traktoron de la brigado por sia bezono kaj ekpostulis ĉie privilegion.

Helpate de la brigada partia filio Daj Cun faris memkritikon pri tiu eraro, sed tiam li emfazis sian devenon de malriĉulo kaj atribuis la kaŭzon de la eraro al la malbonulo opiniante ke li estis nur hazarde trompita. En la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, Daj Cun kaj aliaj kamaradoj kune studis la verkon *Ŝtato kaj Revolucio* kaj altigis sian teorian konon. Li diris, ke de post la agrikultura kolektivigo, kvankam la produktaj rimedoj transiris de la privata posedanteco al la socialisma kolektiva posedanteco, tamen li mem ankoraŭ ne komplete rompis rilatojn kun la privata posedanteco kaj lia penso de etproduktanto pri riĉiĝo ankoraŭ ne estis radikale reformita, tial li ĉiam pensas pri si mem. Tio estas la ĉefa kaŭzo de lia eraro. **"La etproduktado konstante, ĉiutage kaj ĉiuhore, spontanee kaj grandkvante produktas kapitalismon kaj burĝojn"**, kiel diris la granda instruanto Lenin, tion oni neniel devas forgesi!

La impeto de la penso de Daj Cun profunde edifis la kadrojn de Hipu-brigado. Ili komprenis, ke por ne fariĝi reviziistoj oni devas diligente studi la revolucian teorion kaj reformi sian penson. Vicsekretario de la partia filio Vang Ĵong ĝuas altan prestiĝon inter la amasoj kaj multaj ameme nomis lin "sekretario Vang". Tamen Vang Ĵong pensis en si: Kial oni nomas min per tiu honora titolo? Ĉu mi impresas per gravmieneco de vicsekretario? Kaj li serioze serĉis la kaŭzon en si. Oni konsilis ke li ne zorgu tian bagatelon. Li tamen respondis: "Ni partiaj kadroj devas servi al la popolo; la popolo estas nia mastro kaj ni estas ĝiaj servantoj. Se ni inversigus tiun rilaton, ni fariĝus reviziistoj. Tio ja estas grava afero." Nun, same kiel Vang Ĵong, la kadroj de la brigado estas rigoraj al si mem kaj serioze reformas sian mondkoncepton. Tio jam fariĝis nova moro de la brigado.

## RIGORAJ AL SI MEM

Tio estas grava sperto de la kadroj de Hipu-brigado en rezisto kontraŭ korupto de burĝa penso. Ili diris ke la influo de kapitalisma forto kaj burĝa ideologio ekzistas ĉiam kaj penetras ĉien. Oni povas rezisti al korupto de la burĝaro, nur se ili estas rigoraj al si mem eĉ en bagatelaĵoj.

Post fariĝo de sekretario de la gubernia partia komitato, Vang Guofan ankoraŭ kumulas la oficon de sekretario de la partia filio de Hipu-brigado. Escepte de ricevo de iom da subvencio en la gubernia oficejo, li persistas en partopreno en produkta laboro de la brigado kaj ricevas dividaĵon de la brigado laŭ siaj laborpoentoj registritaj laŭ samgrada laborforto. Ĉar la familio de Vang Guofan havas membrojn multajn tamen laborfortojn malmultajn, kaj krome liaj edzino kaj bofilino estas ofte malsanaj, lia familio vivas ne tre bone. Li do mobilizis siajn familianojn por bredi porkojn per herboj por solvi siajn malfacilojn. Laborante en la gubernia komitato li prenas manĝon en la oficeja manĝejo kune kun aliaj kadroj kaj oficistoj kaj laborante en kamparo li prenas manĝon en hejmoj de komunumanoj kaj neniam postulis apartan manĝon. Li ofte diris al la kadroj: "Akcepti inviton al festeno kaj donacaĵon, ĉasi privilegion kaj materian ĝuon estas rimedo de la burĝaro por korodi revoluciulojn. Ni devas fari senkompatan batalon kontraŭ ĝi." En tio Vang Guofan starigis bonan ekzemplon por la aliaj kadroj.

Iutage, malbonulo en Hipu-brigado sendis "donacaĵon" per sia bofrato al la hejmo de Vang Guofan, timante punon pro sia subfoso. Vang Guofan portis la "donacaĵon" al la kunveno de la partia filio kaj diris: "Tio estas sukertegita obuso! Ni devas ŝanĝi ĝin en obuson por rebati la malamikon kaj en edukan materialon pri rezisto kontraŭ korupto." La konduto de Vang Guofan profunde edifis la kunvenantojn. De tiam la partia filio de Hipu-brigado starigis regulon, ke por la partiaj kadroj estas malpermesate akcepti inviton al festeno kaj subaĉeton, favori iun pro privata rilato kaj ĉasi privilegion, kaj ĉio devas esti farita laŭ la principoj de la Partio. La partia filio ankaŭ periode faras batalon kontraŭ degenerado. La partiaj kadroj donis multajn ekzemplojn pri rezisto kontraŭ burĝa stilo kaj koruptado.

La vicsekretario de la partia filio Vang Ŝun estas juna kadro elstariĝinta en la Granda Proleta Kultura Revolucio. Pro troa penado en ebenigo de deklivaj kampoj li malsaniĝis. Dum la distribuo de greno, oni donis al lia familio kelkdek ĝinojn da tritiko pli multe ol aliaj konsiderante ke lia malsano estas grava kaj lia apetito malbona. Tion eksciinte li tuj diris al sia edzino: "Ni kadroj estas reprezentantoj de la komunumanoj kaj en nenio superas la komunumanojn, kial do mi prenu pli multe da bona greno?" La edzino klarigis: "Tio estas aparta prizorgo pro via malsano." Vang Ŝun diris: "Hodiaŭ oni donas al mi prizorgon pro tio, morgaŭ pro io alia kaj tiamaniere formiĝos privilegio. Unu fajrero povas kaŭzi incendion. Kion manĝas la komunumanoj, tion ankaŭ ni." Li persvadis la edzinon kaj ŝi redonis la grenon al la produkta brigado.

## ĈIAM VIVI INTER LA AMASOJ

Tio estas tradicio de la kadroj de Hipu-brigado kaj rigardata de ili kiel radikala rimedo kontraŭ burĝa laborstilo kaj la komunumanoj prenas tion kiel mezurilon por elekti kaj kontroli la kadrojn.

Frue jam en la tempo, kiam la 23 malriĉkamparanaj familioj fondis la kooperativon, Vang Guofan kaj la aliaj kadroj de la "Kooperativo de Senhavuloj" famiĝis pro entreprenado de la kooperativo en malfaciloj kune kun la amasoj. Tiam ili portis ŝultre ŝnuron por tiri plugilon kaj falĉilon zone por surmonte kolekti brullignon. Matene la amasoj sekvis iliajn spurojn al kamplaboro, vespere ili hejmen revenis sekvante la spurojn de la amasoj. Oni nomis ilin "feruloj" de la Kooperativo de Senhavuloj". Nun la amasoj intime nomas ilin "kadroj-komunumanoj".

La kadroj de Hipu-brigado devas uzi multan tempon por akcepti vizitantojn aŭ iri alilo-

ken por kunveno, sed ĉiu el ili partoprenas ĉiujare en la kolektiva produkta laboro pli ol 300 tagojn. Post kiam Vang Guofan eklaboris kiel sekretario de la gubernia partia komitato, li ĉiutage devas konsideri kaj trakti multajn aferojn, sed li periode revenas al Hipu-brigado kaj kune kun komunumanoj konstruas digon aŭ ebenigas kampon. Oni diris al li: "Vi estas sekretario de la gubernia partia komitato, por vi sufiĉas prezenti proponojn por nia brigado dum kelkaj tagoj de hejmrestado kaj vi ne bezonas iri al kamplaboro." Vang Guofan respondis: "La ŝtataj kadroj absolute ne devas sin apartigi de produkta laboro kaj la amasoj. Kiel sekretario de la gubernia partia komitato, mi des pli devas doni bonan ekzemplon en tio." La vicsekretario de la partia filio Vang Ŝun devas prizorgi la ĝeneralan laboron de la brigado kaj estas tre okupata, sed li multe partoprenas en fizika laboro. Foje li revenis de kunveno de la provinca urbo al sia gubernia urbo. Kiam li finis la raporton al la gubernia partia komitato estis jam profunda nokto. Aliaj konsilis al li ke li veturu en la sekvanta tago per aŭtobuso al sia brigado. Li tamen rifuzis tion dirante ke se li tiel faros, li ne povos partopreni en la antaŭtagmeza laboro de la sekvanta tago. Li do piediris 20 km. kun sia pakaĵo sur la dorso kaj revenis al Hipu-brigado. Li tuj iris al la porkobredejo anstataŭ al sia domo por tie labori. La komunumanoj diris, ke en ilia Hipu-brigado ne estas tiaj kadroj, kiuj lertas nur paroli, sed ne volas labori aŭ iom laboras surkampe, kaj babilas sensencaĵon senfine en oficejo. Iliaj kadroj faris kion ili diris kaj ili plenumis antaŭ la aliaj kion ili postulis de aliaj.

Hardite en la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la kadroj de Hipu-brigado pliapaŝe altigis sian politikan konscion kaj fortigis sian konsciencon en partoprenado en la kolektiva produkta laboro. Ili diris: "La malnova socio de miloj da jaroj postlasis al ni la malnovan ideon fariĝi supera oficisto por sin riĉigi, akiri sen laborado kaj sin teni super aliaj. Hodiaŭ ni kadroj ne forlasas la kampojn kaj ĉiam laboras kune kun amasoj. Ni estas kaj gvidantoj kaj popolanoj. Tio utilas por elimini la malnovan ideon kaj starigi novan ideon de servo al la popolo." Ĉar ili ne apartiĝas de amasoj kaj produkta laboro, ili tenas plej vastan kaj intiman rilaton kun la amasoj, kaj la revolucio kaj produkto de la brigado iras ĉiam pli bone.



*Daj Cun (la meza)*

GIN HUA:

# Nova revolucia generacio

## —Notoj pri faroj de kompartianino Vang Ajĝen

EN la okuloj de la burĝoj, superulo, profito kaj famo estas la plej allogaj aferoj en la mondo. Sed tiu burĝaj objektoj neniom interesas la proletajn avangardajn batalantojn armitajn per Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso. Kompartianino Vang Ajĝen de Bejhu-brigado de Mingkian-komunumo de la urbo Juci, Ŝanhi-provinco, estas ĝuste tia persono.

### I

Vang Ajĝen estas nun 23-jara. Ŝia avo estis veterana batalanto de la Okavoja Armeo kaj glore martiriĝis en la Kontraŭjapana Rezistmilito. Fininte sian lernadon en duagrada elementa lernejo, ŝi ekokupiĝis pri kamplaboro en la brigado. En 1967, kiam ŝi estis 15-jara, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj rekomendis ŝin labori kiel instruistino en la elementa lernejo administrata de la brigado. Tre juna kaj nealte klera, ŝi ne havis sperton en instruado. Sed ŝi havis revolucian spiriton timi nek malfacilon nek penadon. Laŭ la bezono de sia laboro, ŝi finstudis en kelkaj jaroj la lernobjektojn de unuagrada mezlernejo per memlernado utiligante elpremitajn horojn. Ŝi atente studis la kvar volumojn de la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* kaj foje kaj refoje lernis la instrukciojn donitajn de Prezidanto Maŭ en la Granda Proleta Kultura Revolucio. La instruoj de Prezidanto Maŭ multe vastigis ŝiajn horizontojn. Ŝi ofte pensis, ke antaŭ ŝi kuŝas la problemo kiun vojon iri. Ŝi vidis, ke dum la historia periodo de socialismo ekzistas akra batalo: La Partio deziras kulturi la junulojn en daŭrigantojn de la revolucia afero de la proletaro havantajn altan celon por sin doni al komunismo, dum la burĝaro klopodas ĉiamaniere por misgvidi la junulojn sur eraran vojon. Ŝi firme decidis iri la vojon montritan de Prezidanto Maŭ kaj fariĝi avangarda batalanto de la proletaro kiel revoluciaj martiroj, kiuj neniam ĉasis profiton por si sed sturmis antaŭ aliaj por la popolo.

Bejhu-brigado, al kiu apartenas Vang Ajĝen, konsistas el 199 familioj kaj ĉiu el ĝiaj loĝantoj havas meznombre 0.43 hektaron da agro. Havante tiel multe da agro, la brigado devus liveri ĉiujare grandan kvanton da superbezona greno al la ŝtato. Ĉar iuj brigadaj kadroj estis influataj de la reviziisma linio, klasaj malamikoj faris subfosajn aktivadojn. Rezulte de tio, tiu brigado ne povis altigi sian produktadon kaj fariĝis vaste konata postiĝinta brigado de Juci. Fronte al tio, Vang Ajĝen kun forta revolucia devsento fariĝis iom post iom "homo kiu emas interveni en alies aferojn" post plenumo de sia instrua tasko. Ŝi aktive partoprenis en aktivadoj de la brigado, kaj kiam okazis kunveno de la brigado, ŝi ĝin ĉeestis laŭeble por aŭskulti opiniojn de la amasoj kaj eldiri la siajn. Ŝi mobilizis la amasojn por fari fortegan atakon kontraŭ la malbonaj kondutoj kaj tendencoj. Ŝin timetis homoj de la brigado kiuj faris paŝojn sur la kapitalisman vojon, kaj el ŝia aktivado la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj plie rekonis en ŝi bonan burĝonon.

En 1972, Vang Aĵĝen glore aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio, kaj krome ŝi estis elektita kiel eminenta instruistino de la urbo Juci. Foje ŝi vizitis Daĝaj-brigadon kaj Hijang-gubernion por lerno kaj, vidinte viglan prosperiĝon de la tiea socialisma afero, ŝi ekhavis ankoraŭ pli ardan revolucian entuziasmon. Reveninte al la hejmloko, ŝi diskutis kun la ĉefa respondeculo de Bejhu-brigado, ĉu ilia brigado povas ŝanĝi sian fizionomion kiel Daĝaj kaj Hijang. La respondeculo diris, ke li vizitis Daĝaj kelkfoje, sed ĉiufoje je vido de la aferoj de Bejhu post reveno, li sentis sin senkapabla por ŝanĝi la staton. Tion aŭdinte, Vang Aĵĝen sentis kaj maltrankvilon kaj indignon. Ŝi pensis, ke Bejhu-brigado ne devas ĉiam resti tia. Ŝi decidis forlasi la instruistan postenon kaj reveni al la produkta brigado por ŝanĝi ĝian postiĝintan fizionomion kune kun la amasoj. Ŝi diris sian decidon kaj opinion al la estro de la revolucia komitato de la popola komunumo, kiu delonge deziris trovi en Bejhu-brigado iun kiu povas porti la pezan ŝarĝon, sed tiam ne atendis ŝian peton.

## II

En julio de 1973, la Pedagogia Kolegio de Ŝanhi varbis studentojn kaj oni rekomendis Vang Aĵĝen kiel kandidaton. Ŝi gajnis tre altajn poentojn en la enira ekzameno. Sed ŝia penso ĉiam kroĉiĝis al la aferoj de Bejhu kaj ŝi baraktis en kontraŭdiro. Tiam la sekretario de la komunuma komitato de KPĈ sonde demandis: "Diru, Vang Aĵĝen, ĉu la fizionomio de via Bejhu-vilaĝo povas esti ŝanĝita finfine?" "Kial ne?" ŝi respondis simple. "Tio ĉefe dependas de la gvidantoj. Se la kadroj firme plenumas la revolucian linion de Prezidanto Maŭ donante bonan ekzemplon en iro de la ĝusta vojo, ĝi povas ricevi radikalan ŝanĝon." Ankaŭ la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj deziris, ke ŝi restu en la brigado. Tial la partia komitato de la komunumo subtenis la volon de Vang Aĵĝen reveni al la brigado por fari revolucion. Kvankam ŝi ricevis de la kolegio akceptan sciigon, ŝi tamen decidis ĝin ne viziti.

En tiu momento okazis akra batalo.


La batala spirito de Vang Aĵĝen timigis tiujn homojn kun serioza kapitalisma penso, kiuj deziris ŝin forpeli. La armilo uzata de ili estis penso de burĝaj rajtoj. Ili ĉiamaniere klopodis por ŝin delogi per persona profito, propagandante al ŝi pri la "bonoj" akireblaj per studo en alta lernejo asertante, ke nur stultulo preterlasas ŝancon de vizitado al alta lernejo. Ili diris al ŝi: "Famiĝinta sur la eduka fronto vi tamen estas senscia pri agrikultura produktado, kial do vi ne volas forlasi la terbulojn?" "Diplomite el alta lernejo, vi ricevos salajratan laborpostenon kaj vivos certe pli bone ol kamparano!" Ili instigis la patrinon de Vang Aĵĝen per burĝa penso, ke ŝi kverelu kun sia filino.

Sed Vang Aĵĝen neniom ŝanceliĝis. Ŝi opiniis, ke koncerne al la demando kio estas stulteco, malsamaj klasoj ĉiam havas malsamajn opiniojn. La burĝaro kaj aliaj ekspluatantaj klasoj opinias, ke "ĉiu por si, por ĉiuj Di' ", kaj rigardas tiujn kiuj plej lertas en kalkulado por sia profito kiel homojn plej saĝajn; laŭ ilia opinio la proletaj revoluciuloj kiuj volas sin dediĉi al alta revolucia celo kaj ne ĉasas profiton por si mem estas nur stultuloj. Ŝi pensis, ke la antaŭa malnova Ĉinio fariĝis la hodiaŭa prosperiĝanta socialisma Ĉinio ĝuste dank' al tio, ke sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio miloj kaj dekmiloj da "stultuloj" kiel ŝia avo volonte oferis sian vivon por la revolucio. Kaj ŝi decidis lerni de la martiriĝintaj revoluciuloj kaj resti en la kamparo por plue batali laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

Ankaŭ la patro de Vang Aĵĝen estas kompartiano. Ŝi diris al li: "Bejhu devas ŝanĝi sian fizionomion kiel eble plej rapide. Se ni ne povus tion fari, por kio ni ankoraŭ restu kiel kompartianoj!" Ŝi fine sukcesis akiri la subtenon de sia patro kaj persvadi sian patrinon.

La revolucia ago de Vang Aĵĝen tuj vekis fortan eĥon ĉe la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Bejhu-brigado. La

# Zunji – Fama Urbo en la Ĉina Revolucia Historio




La domo en kiu okazis la Zunji-a Kunveno en januaro de 1935


En Junnan-Gujĝoŭ-a Altebenajo sin trovas monturbo Zunji, fama urbo en la ĉina revolucia historio. En januaro de 1935, kiam la Ruĝa Armeo atingis, en sia Longa Marŝo, la urbon Zunji de Gujĝoŭ-provinco, la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio okazigis plivastigitan kunvenon de la Politika Buroo, nome la Zunji-an Kunvenon kun granda historia signifo. Tiu kunveno finis la regadon de la "maldekstra" oportunisma linio de Vang Ming en la Centra Komitato de la Partio kaj starigis la gvidon de Prezidanto Maŭ Zedong en la tuta Partio kaj la tuta armeo, turnis la linion de la Partio sur la ĝustan trakon de Marksismo-Leninismo kaj tiamaniere savis la Partion, la Ruĝan Armeon kaj la revolucion de Ĉinio. En la pasintaj 40 jaroj, la brilo de la Zunji-a Kunveno lumigis la vojon de la ĉina revolucio en antaŭenmarŝado kaj ebligis al la ĉina revolucio marŝi senĉese de venko al venko ĉiam laŭ la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

En la pasintaj 25 jaroj post la Liberiĝo, Zunji spertis gigantan ŝanĝon. Sub la gvido de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, ĝi fariĝis nova industria urbo kun entreprenoj de metalurgio, maŝinfarado, kemiaĵoj, karbo, elektro, elektronikaj aparatoj, ŝpinaĵoj, teksaĵoj kaj kun disvolviĝantaj fervoja kaj ŝosea tra-



Eksponejo de la Zunji-a Kunveno estas unu el la lokoj por studi la historion de la Komunista Partio de Ĉinio en la batalo inter la du linioj.






Jinghong-ponto, kie popolanoj de Zunji siatempe bonvenigis la Ruĝan Armeon en la Longa Marŝo.

fikoj. La silkajoj, tanino, kalia permanganato kaj aliaj industriaj produktajoj kaj multaj specoj de metiaj kaj metiartaj produktajoj de Zunji havas grandan debiton en kaj ekster Ĉinio. La popolaj komunumoj de ĝia ĉirkaŭurbo senĉese altigas la mekanikigon de sia terkulturado, grandskale levis la grenproduktan kvanton kaj multe plibonigis la vivon de la popolanoj. Nun ankaŭ la kultura kaj higiena aferoj ricevis rimarkindan disvolviĝon. Tie troviĝas 78 mezlernejoj kaj mezgradaj profesiaj lernejoj kaj fondiĝis ankaŭ alta lernejo. La nombro de ĝiaj kuracejoj kaj hospitaloj kreskis multoble kaj tiu de medicinaj laborantoj je pli ol centoblo. En la malnova socio, Zunji estis malriĉa kaj postiĝinta. Sed hodiaŭ ĝi ŝanĝiĝis radikale.


Ĉiutage multaj homoj venas de malproksimaj lokoj al la fama historia urbo sopirata de ĉiunaciecaj popolanoj de la tuta lando por rigardi la domon kie okazis la Zunji-a Kunveno kaj lerni de la historio. La vastaj popolamasoj en Zunji klopodas ankoraŭ pli energie por disvolvi la revolucian spiriton de la Zunji-a Kunveno kaj la gloran tradicion de la Ruĝa Armeo kaj konstrui la gloran urbon en ankoraŭ pli belan.

Parto de Zunji






Parto de la nova industria kvartalo




Fandejo de la Fabriko de Feraj Alojoj






Kontrolejo de la Silkfabriko de Zunji

Printempa plugado en la ĉirkaŭurbo de Zunji





Studentoj kaj instruisto de la Medicina Kolegio de Zunji faras biokemian eksperimenton.

# Nova Laborista Loĝkvartalo de Ŝanhajo



Parto de la nova laborista loĝkvartalo Pengpuhincun

EKDE la Liberiĝo de Ŝanhajo, al la laboranta popolo multe pliboniĝis la loĝejaj kondiĉoj sekve de la ŝanĝo de la socia sistemo kaj la disvolviĝo de la produktado. Dank' al la zorgo de la Partio kaj la registaro, estis konstruita la unua nova laborista loĝkvartalo Caŭjanghincun de Ŝanhajo en 1951, kaj depost tiam konstruiĝis grandaj nombroj da laboristaj loĝdomoj en la novaj industriaj kvartaloj en la ĉirkaŭaĵo de Ŝanhajo.

La nova loĝkvartalo Pengpuhincun estas alia el tiaj loĝkvartaloj konstruitaj. En la pasinteco tie loĝis neniu homo, sed nun ekaperis laborista loĝkvartalo kun pli ol 18,000 loĝantoj. Tiu loĝkvartalo okupas areon de 220,000 kvadrataj metroj kaj en ĝiaj 156 3-5-etaĝaj domoj loĝas pli ol 4,200 laboristaj familioj. La ĉambroj de tiuj domoj estas helaj kaj vastaj kaj ĉiuj apartamentoj havas necesajn instalaĵojn por lumigado, akvoprovizado kaj higiena oportuno. En la kvartalo troviĝas mezgrada kaj elementaj lernejoj, infanĝardenoj, infanvartejoj, hospitalo, magazeno kaj aliaj publikaj servoj.

Sub la gvido de la Partio, familianoj de la laboristoj kaj oficistoj estis iom post iom organizitaj por partopreni en kolektiva produkta laboro kaj ili jam fondis 6 laborejojn dependajn al fabrikoj kaj 5 servogrupojn por ĉiutagaj bezonoj. La laborejoj jam havas certgrade mekanikajn ekipaĵojn kaj senĉese altigas sian produktopovon.

La dommastrinoj ekiris el siaj domoj kaj partoprenis en la socialisma konstruado. Kun la profundiĝo de la socialisma revolucio kaj precipe dank' al hardado en la Granda Proleta Kultura Revolucio, la politika konscio de la dommastrinoj multe altiĝis kaj profunda ŝanĝo okazis al ilia spirita fizionomio. En la postlabora kleriga kaj politika lernejo fondita de la kvartalo, ili klerigas sin politike kaj kulture. Kaj de tempo al tempo ili funkcias studrondojn pri teorio kaj faras amasan kritikon kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziisma linio.

Dommastrinoj laboras en fabriko starigita de la kvartalo






Kadroj de la kvartalo en studo de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso

La partia organizo tre zorgas pri la kreskado de la geknaboj kaj gejunuloj. Ĉirkaŭ 200 homoj estis organizitaj kiel eksterlernejaj gviduloj por helpi la lernantojn en studado de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj eduki ilin bojkoti kaj venki burĝajn pensojn per proletaj pensoj. Kaj sub la kuna edukado de la lernejoj kaj la familioj sane kreskadas la geknaboj. Ili aktive faras bonojn por la popolamasoj kaj partoprenas en klasa batalo. Ili ofte partoprenas en fizika laboro en stratoj, fabrikoj kaj kamparo kaj amuzas la popolamasojn per artaj prezentadoj, trovante unuanimajn laŭdojn ĉe la loĝantaro.

La nova fizionomio plena de viveco akre kontrastas kun tiu de la kvartaloj de kadukaj budoj, en kiuj la laboranta popolo devis sin kunpremi kaj vivaĉi pli mizere ol ŝarĝbrutoj antaŭ la Liberiĝo. Sub la gvido de la Partio, la laboranta popolo jam fariĝis mastro de la nova socio kaj ili senĉese faras novajn kontribuojn al la socialisma konstruado.



En operaciejo de la kuracejo de la kvartalo



Kadroj de la kvartalo vizitas emeritan laboriston.

Emerita laboristino edukas la geknabojn per rakontado de siaj suferplenaj travivajoj antaŭ la Liberiĝo.





Sub la gvido de laboristo geknaboj sin preparas al fizika laboro.



Infanoj de infanĝardeno de la kvartalo




En legomvendejo

amasoj subtenis ŝin. Nombro da junuloj tuj sekvis ŝian ekzemplon. Du junulinoj ŝanĝis sian decidon daŭrigi sian lernadon en supera mezlernejo kaj restis por labori kune kun Vang Aj̑ĝen. Kelkaj 1973-jaraj diplomitaj lernantoj de la Dua Mezlernejo de Juci iris al Bejhu por fari socian enketadon. Informiĝinte pri la revolucia ago de Vang Aj̑ĝen, ili faris propagandon pri tio en sia lernejo, kaj rezulte de tio 11 membroj de la Komunisma Junulara Ligo meminiciate petis permeson fiksloĝiĝi kaj labori en Bejhu. Pli poste, ankoraŭ unu intelekta junulino de alia lernejo venis. Tio formis varman revolucian atmosferon en Bejhu-brigado.

Je la komenco Vang Aj̑ĝen volis nur labori kiel asistanto de la brigada gvidanto. Sed vidinte ke ŝi estas tiel firmdecida, plena je revolucia volo kaj amata de la amaso, la partia komitato de la komunumo elektis ŝin sekretario de la partia filio de Bejhu-brigado, post interkonsiliĝo kun la partiaj membroj de tiu brigado, en septembro 1973.

### III

Fariĝinte sekretario Vang Aj̑ĝen trovis antaŭ si la malfacilojn, ke malforta estas la kolektiva ekonomio, serioza la kapitalisma tendenco kiu ne nur subfosas la kolektivan ekonomion sed ankaŭ kreas malfacilojn kontraŭ ŝi, kaj ŝi havas sperton nek pri produkto nek pri laboroj en la kamparo. Tial iuj asertis, ke eĉ tri Vang Aj̑ĝen ne povus ŝanĝi la fizionomion de Bejhu, por ne paroli pri nur ŝi sola.

Sed vera revoluciulo armita per Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso povas mobilizi kaj organizi la vastajn amasojn por venki ĉiujn malfacilojn. Tion pruvis la praktikado de Bejhu en pli ol unu jaro.

Transpreninte la laboron, Vang Aj̑ĝen tuj metis sian atenton sur la ĉefan kontraŭdiron laŭ instruo de Prezidanto Maŭ, starigis studan grupon por resumi la historian sperton kaj lecionojn de Bejhu en komparo kun tiuj de Daĝaj kaj Hijang kaj studi la fundamentan linion de la Partio, mobilizis la amasojn por eltrovi la demandojn koncerne al la batalo inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj kaj resumi spertojn kaj lecionojn de la partia filio en la pasintaj dekkelkaj jaroj. Poste ŝi petis maljunajn malriĉkamparanojn fari klasan edukon al la amasoj per komparo de la nova socio kun la malnova kaj mobilizis la amasojn por bati klasajn malamikojn kaj kritiki kapitalisman tendencon profitante la favoran okazon de la kritikado kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio. Fariĝinte partifilia sekretario, Vang Aj̑ĝen persistis en partopreno de kolektiva produkta laboro kaj donis bonan ekzemplon en tio. Ŝi ne lertas en terkulturo kaj dum forigo de superfluaj miliplantidoj, ŝi ne povis labori tiel rapide kiel la aliaj. Dum laborpaŭzo, ŝi ne ripozis sed lernis modeste de komunumanoj spertaj en produkta laboro. Ŝia patro tre maltrankviliĝis pri tio, ke ŝi ne havis laboran sperton. Vang Aj̑ĝen diris al li: "Ne maltrankviliĝu pri tio. Kiam mi komencis labori kiel instruistino, mi ja ne havis sperton ankaŭ en tio." Krom modesta lernado de aliaj, ŝi ankaŭ donis atenton al tio, ke la veteranaj kadroj bone ludu siajn rolojn. Ŝi organizis gejunulojn por fari revoluciajn komentarietojn kaj disvolvi revoluciajn artajn kaj literaturajn aktivadojn por laŭdi novajn homojn kaj novajn aferojn de socialismo kaj kritiki burĝajn pensojn por plene mobilizi la aktivecon de la komunumanoj.

Antaŭ la aŭtuna rikolto de la pasinta jaro, kiam Bejhu-brigado renkontis malfacilojn en ekonomio, Vang Aj̑ĝen aktive gvidis la amasojn por analizi la kaŭzon de la malfacilo kaj konstatis, ke ĝi rezultis el la interveno kaj subfoso de la reviziisma linio. Ŝi diris al la amasoj: "Ĉu malfacilo? Ĉu elĉerpiĝo? Pensu pri la antaŭuloj de l' revolucio. Ĉu malfacilo? Ĉu elĉerpiĝo? Pensu pri l' damninda malnova socio. Ĉu malfacilo? Ĉu elĉerpiĝo? Pensu, por kiu estas la revolucio." Ŝi mobilizis la amasojn por venki la malfacilojn sin apogante sur la propraj fortoj kaj luktante kun penemo. En aŭtuno ŝi trovis, ke al ŝafisto mankis vatita litkovrilo por nokte gardi ŝafaron, ŝi portis al li siajn feltan matracon kaj litkovrilon vatitan. Kortuŝita de tio la ŝafisto re-

portis en la sekvanta tago al ŝi la litaĵojn kaj diris, ke li povas venki la malfacilon. Vang Aĵĝen opinias, ke ju pli malfacila estas la tempo, des pli rigora devas esti kompartiano al si mem kaj des pli zorgi pri la laboro kaj pri la amasoj.

Sub la edifo de la bona ekzemplo de Vang Aĵĝen, la aliaj kadroj, kompartianoj kaj membroj de la Komunisma Junulara Ligo ĉiuj ŝin imitis. Plene disvolvante la revolucian spiriton la amasoj laboregis energie kaj peneme. Altiĝis la socialisma spirito kaj subpremiĝis la kapitalisma tendenco. Kaj en la jaro 1974 ili sukcesis fari kion ili ne povis en la pasintaj dekkelkaj jaroj. La brigado decidis movi 9,000 kubmetrojn da tero por konstrui baraĵon por akvokonduko. Tiun laboron oni ne povis plenumi en la pasintaj kelkaj jaroj, sed sukcesis plenumi en iom pli ol unu monato en la pasinta jaro. Ili sukcesis konstrui ankaŭ kanalon likimunan kun longeco de pli ol 2,000 metroj. La areo de irigaciataj kampoj estis plivastigita de 20 hektaroj al pli ol 50 hektaroj. Ankaŭ la kultivado estis plibonigita. Dank' al tio, la totala grenprodukta kvanto de la tuta brigado impete altiĝis de pli ol 110 tunoj de la antaŭa jaro al 360 tunoj. En tiu jaro, ili ne nur ne bezonis grenprovizon de la ŝtato, sed eĉ vendis 105 tunojn al ĝi krom rezerva greno por la brigado.

"Vang Aĵĝen kompetentas! Ŝi estas vera revoluciulino kaj plenumas la ĝustan linion." "Ŝia kompetenteco troviĝas en ŝia revolucia spirito." Tio estas la nunaj opinioj de multaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Bejhu-brigado pri Vang Aĵĝen.




## NOVAJ SUKCESOJ DE SCIENCA ESPLORADO PRI DEZERTO

La dezertoj de nia lando ampleksantaj 30% el nia tuta teritorio dislokiĝas en la provincoj Gansu, Kinghaj, Ŝenhi, Hejlonggiang, Gilin kaj Liaŭning kaj la aŭtonomaj regionoj Hingiang, Ninghia kaj la Interna Mongolio. Kvankam antaŭ pli ol 2,000 jaroj nia laboranta popolo jam komencis batali kontraŭ dezerto, tamen dum la reakcia regado de Kuomintango nenia scienca esploro pri dezerto estis farita. Nur post la Liberiĝo, nia lando starigis vicaron da esploristoj por fari la laboron, kiuj entreprenis surkampan esploradon kaj serion da observoj kaj eksperimentoj en dezert-regionoj.

En la Granda Proleta Kultura Revolucio la sciencaj dezert-esplorantoj profundiĝis en produktadon laŭ instruo de Prezidanto Maŭ, kaj, efektivigante kombinon de la amasoj, gvidaj kadroj kaj sciencaj esplorantoj kaj de produkto, utiligo kaj scienca esplorado, ili venkis multajn malfacilojn kaj plene esploris sur- kaj sub-terajn akvofontojn, naturajn herbejojn, ekspluateblajn virgajn areojn, pli ol 100 speciojn de sovaĝaj vegetaĵoj kaj aliajn riĉfontojn. Esplorado kaj studo estis faritaj ankaŭ pri formiĝo kaj disvolviĝo de dezertoj, pri movadleĝo de sablovento kaj pri reformado kaj utiligo de la dezertaj regionoj. Kombinante prospektoradon, projektadon, konstruplenumon, konstatadon de efikoj, taksadon kaj disvastigon kun produktado, kune kun la amasoj ili eltiris, tra resumado de sperto, serion da rimedoj por ŝirmi kampojn kaj fervojojn kontraŭ sablo kaj sukcesis fabriki maŝinon, kiu povas produkti ĉiutage 10 tunojn da dolĉa akvo. Ankaŭ la studo pri fiksado de sablo per kemiaĵo akiris novan progreson.

ĈEN MEJFENG:

# NOVAJN KANTOJN EL ĈANGBAJ-MONTARO

— Pri juna kore-nacieca komponisto Kim Ponghaŭ

EN aŭgusto de 1959, kiam la 21-jara Kim Ponghaŭ venis al popola komunumo apud Tumen-rivero por partopreni en fizika laboro, li eĉ ne pensis pri komponado. Sed la heroa spirito kaj firma volo de la komunumanoj en reformado de la naturo multe kuraĝigis la junulon. Precipe kortuŝis lin la novaj popolkantoj verkitaj de komunumanoj en postlaboraj horoj. Unu el ili tekstas jene:

*Ordonas ni, Malsaĝaj Avoj* de l' moderna tempo:*
*Oferu tuj, Ĉangbaj-montaro, ĉiujn la trezorojn!*
*Hakilojn svingas ni por fendi montojn,*
*mondkrea ard' plenigas niajn korojn.*
*Bravkore ni venigis akvon de l' Arĝentrivero***
*kaj finkonstruis ŝtuparkampojn alte en l' aero.*

Kiel bone estus, pensis Kim Ponghaŭ, se oni povus verki muzikon al tiuj emociaj poemoj. De tiam li tage laboris kune kun komunumanoj kaj nokte lernis komponadon. Kaj tiamaniere naskiĝis lia unua kanto *Bravan volon havas la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.* Tiu kanto estis varme akceptita de la amasoj kaj rapide disvastiĝis en la kore-naciecaj komunumanoj lertaj kaj en kantado kaj en dancado.

Kaj per tio Kim Ponghaŭ komencis sian vojon de muzika verkado. En la pasintaj pli ol dek jaroj li kaj liaj kolegoj kun arda entuziasmo venis en la amasojn por fari prezentadon por ili laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ Zedong **"la literaturo kaj arto devas servi al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, al la politiko de la proletaro kaj al socialismo".** La riĉa kaj multkolora batala vivo de la amasoj havigis al li neelĉerpeblan fonton de arta verkado. En sia diligenta praktiko li verkis sinsekve pli ol 100 revoluciajn kantojn, el kiuj la kantoj *La janbian-a popolo amas Prezidanton Maŭ, La ruĝa suno lumigas la limregionon, Mi flosigas lignon por la revolucio* estas jam bone konataj kaj ofte kantataj de la diversnaciecaj popolanoj de nia tuta lando.

En la proceso de longtempa profundiĝo en la vivo Kim Ponghaŭ akiris bonan konon pri Janbian kaj ankoraŭ pli amas la tieajn popolanojn de diversaj naciecoj. Tie li vidis multajn emociajn scenojn kaj ofte aŭdis ke popo-

*Kim Ponghaŭ sin okupas pri komponado*



lanoj per simplaj sed sinceraj vortoj esprimis sian profundan proletan senton al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. En Printempa Festo Kim Ponghaŭ venis en la kamparon kun sia ensemblo kaj en la hejmo de revolucia martiro li kaj kelkaj aliaj aktoroj speciale faris prezentadon por avo kun aĝo de pli ol 60 jaroj. Post la prezentado la kortuŝita maljunulo diris kun larmoj: "Estas Prezidanto Maŭ kiu savis min el la maro de suferoj! Hodiaŭ vi eĉ faris specialan prezentadon por mi, kaj por tiu feliĉo mi devas danki Prezidanton Maŭ! Li estas la ruĝa suno en la koro de la limregiona popolo!" Ĉe tio la maljunulo elprenis vinon multjare konservitan por ke ĉiuj kune kun li trinku pro la sano de Prezidanto Maŭ. La emocia sceno kaj la elkoraj sinceraj vortoj de la maljunulo tiel forte tuŝis Kim Ponghaŭ ke la sango en lia koro ondadis kiel la torento de Hajlan-rivero. Tiam li rememoris pri sia infana vivo. Antaŭ la Liberiĝo liaj gepatroj ne povantaj toleri la subpremadon de bienuloj forlasis la hejmlokon, iris 500 kilometrojn kaj venis al la urbeto Helong kunportante lin surdorse. Survoje ili almozpetis de vilaĝo al vilaĝo kaj spertis ĉiajn turmentojn. Sed apenaŭ ili fiksloĝiĝis en Helong lia patro jam estis kaptita de japanaj agresantoj kaj sendita aliloken por labori kiel kulio. Tiel la patrino kaj filo perdis sian apoganton en la vivo. En la jaro 1945 Helong liberiĝis kaj la familio ekvivis feliĉe. La ok-jara Kim Ponghaŭ komencis viziti lernejon. En elementa kaj meza lernejoj li fariĝis membro de ĥoroj kaj varme prikantis Prezidanton Maŭ, la Komunistan Partion kaj la novan socion. En 1957 la Partio sendis lin al la gubernia ensemblo de Helong de la Janbian-a Kore-nacieca Aŭtonoma Subprovinco. Pensante pri tio Kim Ponghaŭ ne plu povis regi sian emociiĝon kaj same kiel la maljunulo diris el la koro: "Prezidanto Maŭ estas la ruĝa suno en nia koro!"


Post plurmonata praktiko Kim Ponghaŭ sukcese komponis la kanto *La janbian-a popolo amas Prezidanton Maŭ*, kiu per arda kaj flua melodio esprimas la varman amon de la diversnaciecaj janbian-anoj al la gvidanto Prezidanto Maŭ:

*"La ruĝa sun' en nia koro*
*Ruĝigas la limregionon . . ."*

*Kim Ponghaŭ (dekstre en la fronto) rigardas prezentadon kune kun amasoj.*



*Kim Ponghaŭ kolektas opiniojn de amasoj.*



Multaj el la revoluciaj kantoj de Kim Ponghaŭ estis verkitaj surbaze de akumulo de riĉaj vivaj materialoj.

Tamen lia vojo ne estis ĉiam ebena. Kiam li komponis nombron da kantoj ŝatataj de la amasoj, iuj komencis inokuli al li burĝan individualismon pri ĉaso de famiĝo, sekve de tio Kim Ponghaŭ malrapidigis sian paŝon sur la vojo de kombiniĝo kun la amasoj por certa tempo kaj emis legi librojn fermante sin en ĉambro kun dezirego viziti konservatorion. Pro forlaso de la arda batalo de la amasoj al liaj poste komponitaj kantoj mankis revolucia brilo. Lia kanto *Registristino de laborpoentoj* sonas mole kaj malvigle kaj tuj ricevis mallaŭdojn de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Rimarkinte tion la partia filio admonis lin denove studi la artikolon de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an.* Prezidanto Maŭ diris: **"Ĉiuj revoluciaj literaturistoj kaj artistoj, ĉiuj multpromesaj literaturistoj kaj artistoj en Ĉinio, nepre devas iri en la amasojn, nepre devas iri por longa tempo, senkondiĉe kaj tutkore inter la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, en la ardajn batalojn." "La laboro de ĉiu revolucia literaturisto aŭ artisto havas signifon nur se li intime ligiĝas kun la amasoj, esprimas ilin kaj agas kiel ilia fidela proparolanto."** Ekzamenante sin per tiuj instruoj kaj pripensante la kritikojn de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj Kim Ponghaŭ dolore ekkonsciis, ke li estis venenita de la reviziisma literatura kaj arta linio.

Ĝuste en tiu tempo komenciĝis la Granda Proleta Kultura Revolucio. Kim Ponghaŭ ĉerpis lecionon el la pasinteco, kritikis la reviziisman artan linion kune kun la amasoj, firmigis la decidon iri la vojon de kombiniĝo kun la laboristoj kaj kamparanoj kaj prenis la novan socialisman Janbian kiel grandan klasĉambron por lerni komponadon. En la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio Kim Ponghaŭ kritikis la reakciajn tezojn de Lin Biaŭ kaj similaj pri "genio" kaj "inspiro" kaj plialtigis sian konsciencon en efektivigo de la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ. Li denove venis inter la amasojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj prezentas kaj komponas por ili. La kanto *Mi flosigas lignon por la revolucio* ĝuste naskiĝis en la daŭro de lia plua profundiĝo en la batala vivo de la amasoj.

Kim Ponghaŭ ofte iris al arbohakejo, kie liaj du junaj fratoj laboras kiel forstokulturistoj, pro tio li bone konis la laboran vivon de flosistoj kaj aŭdis multajn kortuŝajn rakontojn pri ili. Matene apenaŭ la suno leviĝis kaj forbalais la nebulon super Tumen-rivero, jam aŭdiĝis demalproksime laborkantoj de flosistoj. Kim Ponghaŭ vidis, ke flosistoj movas remstangojn en la manoj starante sur flosiloj por transporti grandkvante lignon al loko pli ol 50 kilometrojn fora tra ravinoj kaj preter danĝeraj rifoj kaj malprofundejoj. Li ankaŭ ofte surpaŝis flosilojn kaj laboris kune kun la flosistoj. En la kuna batala vivo Kim Ponghaŭ profunde sentis grandanimecon de la flosistoj penlaborantaj por la revolucio.

*La sun' leviĝis kaj tuj malaperis la nebulo.*
*Ni flosigadas kun remstangoj lignon sur rivero.*
*Nin bonvenigas vice l' montoj sur la riverbordoj*
*kaj akvobirdoj gaje kantas por ni en l' aero.*
*Ni sagrapide impetadas tra la ondlegio*
*pelante la flosilojn lignajn por revolucio.*

Por tiu poemo plena de braveco Kim Ponghaŭ verkis muzikon kun fortaj taktoj kaj rapida melodio, prezentante per ĝi la revolucian heroismon kaj optimismon de la arbohakistoj.

Dank' al multjara batala hardado kaj arta praktikado Kim Ponghaŭ rapide kreskis kaj en 1972 li glore aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. Retrorigardante la iritan vojon de verkado li diris kun profunda sento: "La Partio estas la patrino nutranta min en kreskado, la popolamasoj estas miaj instruistoj kaj la arda batala vivo estas mia klasĉambro."

---

* *Malsaĝa Avo estas montotranslokiga heroo en vaste konata ĉina fablo.*

** *La Arĝentrivero estas ĉina nomo de la Lakta Vojo*

# Ĉinio liberigis militajn krimulojn per speciala amnestio

EN la 19-a de marto de 1975, laŭ instrukcio de Prezidanto Maŭ Zedong kaj la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la propono de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj, la Konstanta Komitato de la Kvara Tutlanda Popola Kongreso de nia lando decidis liberigi ĉiujn enkarcerajn militajn krimulojn. Tiu decido estis jam plenumita de la Plej Supera Popola Juĝejo.

La speciala amnestio plene enkorpigis la proletan revolucian linion kaj politikon de Prezidanto Maŭ, pruvis ke la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio de nia lando gajnis grandan venkon kaj montris, ke nia socialisma patrolando fariĝis ankoraŭ pli stabila kaj solidara kaj la diktaturo de la proletaro ankoraŭ pli firma. Ĝi havas gravan signifon por disvolvi la revolucian unuecan fronton de nia lando, turni pasivajn faktorojn en aktivajn, unuigi ĉiujn unuigeblajn homojn, akceli la disvolviĝon de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de nia lando kaj instigi la patriotan bataladon de la Tajvan-a popolo kontraŭ la kliko de Ĉiang Kajŝek.

En la pasintaj jaroj, laŭ la politiko de Prezidanto Maŭ pri kombino de punado kun indulgo kaj korpolabora reformado kun ideologia edukado, la registaro de nia lando jam reformis multajn militajn krimulojn. Plejparto de la jam amnestiitaj kaj liberigitaj militaj krimuloj kondutis bone aŭ kompare bone, iuj eĉ faris kontribuojn en la socialisma konstruado. Post longtempa edukado kaj reformado, precipe dank' al eduko de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj Kritikado kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la militaj krimuloj ĉifoje amnestiitaj kaj liberigitaj ĉiuj montris certagrade la volon reformi sin en bonulon kaj dankis la Partion kaj la registaron pro ilia saviĝo.

Ĉifoje, la militaj krimuloj liberigitaj per speciala amnestio sume nombriĝis 293, inter kiuj troviĝis 219 armeaj oficiroj, 21 partiaj kaj registaraj oficistoj, 50 spionoj de la kliko de Ĉiang Kajŝek, 2 militaj krimuloj de la pupa "Manĉuguo" kaj 1 milita krimulo de la kuomintanga organizo de Sujjuan kaj Mongolio. Nun, ĉiuj kazoj de enkarceraj militaj krimuloj estas jam likviditaj.

Laŭ la spirito de la instrukcio de Prezidanto Maŭ, ĉiuj militaj krimuloj liberigitaj ĉifoje per speciala amnestio ricevis civitanecon, la laborkapablaj el ili povas ricevi konvenajn laborojn, la malsanaj povas ĝui senpagan kuracadon, la nelaborkapablaj ricevos vivtenadon kaj tiuj kiuj volas iri al Tajvan ricevos vojaĝpagon kaj faciligojn kaj se ili volos reveni, ili estos bonvenigataj. Okaze de la liberigo oni veturigis ilin en Pekinon por ĉeesti la adiaŭan kunvenon kaj poste organizis ilin por fari lernan vizitadon.

Inter la militaj krimuloj liberigitaj per speciala amnestio troviĝas: Huang Vej, generalo-leŭtenanto, komandanto de la 12-a Armea Grupo de Kuomintango; Li Giusi, generalo-leŭtenanto, vickomandanto de la 13-a Armea Grupo de Kuomintango; Ĝuang Cunfu, generalo-leŭtenanto, komandanto de la Paciga Ĉefstabo de la Henan-Hubej-Anhuj-a Limregiono de Kuomintango; Song Kinghjuan, generalo-leŭtenanto, komamdanto de la Ataka Brigado en la Ŝanhi-Ŝenhi-a Limregiono de Kuomintango; Vang Hian, generalo-leŭtenanto, komandanto de la Sindefenda Korpuso de

la Henan-Hubej-Anhuj-a Limregiono sub la kuomintanga "Bandit-Eksterma Ĉefstabo" de Centra Ĉinio; Vang Hjuji, generalo-leŭtenanto, komandanto de la Rekruta Kolono de la 6-a Organiza kaj Trejna Ĉefstabo de Kuomintango; Guo Jiju, generalo-leŭtenanto, estro de la Oficejo de la kuomintanga Hjuĝoŭ-a "Bandit-Eksterma Ĉefstabo"; Ĉen Ŝiĝang, generalo-leŭtenanto, estro de la 25-a Korpuso de Kuomintango; Vang Bingjue, generalo-leŭtenanto, estro de la 51-a Korpuso de Kuomintango; Liu Ĝenhiang, generalo-leŭtenanto, estro de la 64-a Korpuso de Kuomintango; Ven Kiang, generalo-leŭtenanto, vicstabestro de la Antaŭenmarŝa Komandejo de la kuomintanga Hjuĝoŭ-a "Bandit-Eksterma Ĉefstabo" kaj direktoro de la Norda Branĉo de la Esplora kaj Statistika Buroo de la Milita Konsilantaro de Kuomintango; Hu Ging-an, generalo-leŭtenanto, membro de la Plana Komitato de la Buroo de Sekreta Informo de la Ministerio de Nacidefendo de Kuomintango; Ven Venhiu, generalo-majoro, aganta stabestro de la 12-a Armea Grupo de Kuomintango; Ŝen Ce, generalo-majoro, estro de la 114-a Korpuso de Kuomintango; Ĝoŭ Kajĉeng, generalo-majoro, estro de la 8-a Korpuso de Kuomintango; Li Ginhjuan, generalo-majoro, estro de la 64-a Korpuso de Kuomintango; Caj Hingsan, generalo-majoro, komandanto de la Junulara Serva Korpuso en Orienta Gianghi de la Junulara Nacisava Korpuso de Kuomintango; Ĉen Juanhiang, generalo-majoro, vicestro de la 41-a Korpuso de Kuomintango; Li Ziliang, generalo-majoro, vicestro de la 4-a Korpuso de Kuomintango; Liu Depu, generalo-majoro, vicestro de la 49-a Korpuso de Kuomintango; Guo Gikian, generalo-majoro, vicestro de la 5-a Korpuso de Kuomintango; Vu Ĝifen, generalo-majoro, stabestro de la 25-a Korpuso de Kuomintango; Liu Gianŝi, generalo-majoro, stabestro de la 37-a Korpuso de Kuomintango; Ĉen Janmaŭ, generalo-majoro, stabestro de la 63-a Korpuso de Kuomintango; Li Ŝenjan, generalo-majoro, estro de la 268-a Divizio de la 99-a Korpuso de Kuomintango; Jin Ĝongjue, generalo-majoro, estro de la 118-a Divizio de Kuomintango; Luo Ĝoŭneng, generalo-majoro, estro de la 230-a Divizio de la 21-a Korpuso de Kuomintango; Li Gieli, generalo-majoro, estro de la 134-a Divizio de la 20-a Korpuso de Kuomintango; Gong Ŝijing, generalo-majoro, estro de la 32-a Divizio de la 70-a Korpuso de Kuo-



*Vang Bing-jue kaj aliaj naŭ personoj forlasas Pekinon por veturi al Tajvan tra Hongkongo.*

mintango; Vang Hjueĉen, generalo-majoro, estro de la 234-a Divizio de Kuomintango; Ĝang Guanghan, generalo-majoro, estro de la 127-a Divizio de la 47-a Korpuso de Kuomintango; Tang Lian, generalo-majoro, estro de la 90-a Divizio de la 4-a Korpuso de Kuomintango; Li Guanji, generalo-majoro, estro de la 3-a Trejna Divizio de la 32-a Provizora Korpuso de Kuomintango; Hu Junhong, ĝenerala sekretario de la Provinca Partia Organizaĵo de Gianghi de Kuomintango; Ŝang Ĉuandaŭ, direktoro de Civilafera Departemento de Gilin-provinco kaj urbestro de Ĉangĉun de Kuomintango; Hu Menghua, estro de la kuomintanga Buroo de Sociaj Aferoj de Tiangin; Ĉen Hjudong, generalo-majoro, vicdirektoro de la Nordorienta Branĉo de la Esplora kaj Statistika Buroo de la Milita Konsilantaro de Kuomintango; Ĝoŭ Janghaŭ, vicdirektoro de la Sudokcidenta Speciala Branĉo de la Esplora kaj Statistika Buroo de la Milita Konsilantaro de Kuomintango; Baŭ Gihong, generalo-majoro, estro de la Unua Sekcio de la Esplora kaj Statistika Buroo de la Milita Konsilantaro de Kuomintango; Ĝeng Hilin, estro de la Trejna Sekcio de la Administracio de la Esplora kaj Statistika Buroo de la Milita Konsilantaro de Kuomintango; Duan Keven, generalo-majoro, komisaro de la Esplora kaj Statistika Buroo de la Milita Konsilantaro de Kuomintango; Jue Ĝujuan, estro de la Henan-a Stacio de la Esplora kaj Statistika Buroo de la Milita Konsilantaro de Kuomintango; He Ĉonghiaŭ, estro de la Guangdong-a Stacio de la Esplora kaj Statistika Buroo de la Milita Konsilantaro de Kuomintango; Hie Dajŝeng, estro de la Guanghi-a Stacio de la Esplora kaj Statistika Buroo de la Milita Konsilantaro de Kuomintango; Huang Kangjong, generalo-majoro, estro de la Hunan-a Stacio de la Buroo de Sekreta Informo de la Nacidefenda Ministerio de Kuomintango; Ĝang Vejhan, estro de la Ĝegiang-a Stacio de la Buroo de Sekreta Informo de la Nacidefenda Ministerio de Kuomintango; Ŝen Juncun, generalo-majoro, vicestro de la Dua Departemento de la Nacidefenda Ministerio de Kuomintango; Kiu Ŝengjun, generalo-majoro, estro de la Ĝenerala Telekomunika Centro de la Dua Departemento de la Nacidefenda Ministerio de Kuomintango; Ĝang Ven (Ĝang Guodong), sekretario de la Administracio de la Centra Esplora kaj Statistika Buroo de Kuomintango kaj estro de ĝia Ĉongking-a Branĉo; Vang Conghian, vicestro de la Nordokcidenta Branĉo de la Centra Esplora kaj Statistika Buroo de Kuomintango; Liu Gujnan, estro de la Esplora Oficejo de Mongolio kaj Tibeto sub la Centra Esplora kaj Statistika Buroo de Kuomintango; Ŝaŭ Ping, estro de la Siĉuan-a Esplora kaj Statistika Oficejo sub la Centra Esplora kaj Statistika Buroo de Kuomintango; Hu Taŭ, sekretario de la Siĉuan-a Esplora kaj Statistika Oficejo sub la Centra Esplora kaj Statistika Buroo de Kuomintango; Vu Ĵuĉeng, estro de la Hikang-a Esplora kaj Statistika Oficejo sub la Centra Esplora kaj Statistika Buroo de Kuomintango; Hian Daki, estro de la Siĉuan-a Sekcio de la Esplora Buroo de la Ministerio de Internaj Aferoj de Kuomintango; Sun Bingli, estro de la Junnan-a Sekcio de la Esplora Buroo de la Ministerio de Internaj Aferoj de Kuomintango; Li Hanjuan, policestro de Tiangin de Kuomintango; Guo Ĵuolin, generalo-leŭtenanto, komandanto de la 11-a Milita Regiono de la pupa "Manĉuguo"; Ki Ĝiĝeng, ĝenerala inspektoro de la ĉefurba policejo de la pupa "Manĉuguo"; kaj Ojunbilig (Ĝaŭ Ĉengbi), ĝenerala sekretario de la Sujjuan-Mongolia Ĉefregiono kaj estro de la Esplora kaj Statistika Oficejo de Kuomintango, k. a.

En la 23-a de marto, la partiaj kaj ŝtataj gvidantoj de nia lando Je Gianjing, Hua Guofeng, Vu De, vicprezidanto de la Tutlanda Komitato de la Politika Interkonsiliĝa Konferenco Ŝen Janbing, prezidanto de la Plej Supera Popola Juĝejo Giang Hua kaj aliaj koncernataj respondeculoj, Gi Pengfej, Liaŭ Ĉengĝi k. a. akceptis ĉiujn liberigitojn je la speciala amnestio. Estis akceptitaj ankaŭ Caj Ĵuoŝu, edzino de Huang Vej, kaj lia filino Huang Minnan; Song Ginglan, edzino de Li Giusi, kaj lia filo Li Venhua; kaj Liu Pejhian, filo de Liu Ĝenhiang.

Dum la akceptado, Vicprezidanto Je Gianjing faris paroladon. Parolante pri la situacio en kaj ekster la lando li diris, ke la liberigitoj je la speciala amnestio povas viziti fabrikojn, kamparon kaj lernejojn en Pekino, rigardi la bonegajn situaciojn de la industria kaj agrikultura frontoj, rigardi la revolucian energion kaj grandajn fortojn de la laboristaj kaj kamparanaj amasoj, precipe rigardi la grandan ŝanĝiĝon de la spirita fizionomio de la popolamasoj post la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio. Li diris: "Vi bone konas la malnovan socion. Vi povas rememori la pasintecon kaj rigardi la hodiaŭon kaj kompari la du malsamajn sociojn kaj du sociajn sistemojn."

Vicprezidanto Je Gianjing diris kuraĝigante la liberigitojn: "Estas bone ke post la lernado kaj fizika laborado vi ĉiuj havas progresojn de malsamaj gradoj. En la estonteco, vi devos ankoraŭ pli diligente lerni, reformi vian mondkoncepton kaj iri la socialisman vojon sekvante Prezidanton Maŭ kaj la Partion, kaj fari bonojn por la popolo kaj la patrolando."

Vicprezidanto Je Gianjing diris, ke sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ nia popolo konstruis la landon malriĉan kaj postiĝintan en socialisman landon kun fundamenta prospereco nur en pli ol 20 jaroj, ke ni certe povos en la venontaj pli ol 20 jaroj de tiu ĉi jarcento konstrui nian landon en modernan kaj potencan socialisman landon kaj ke ili ĉiuj devas pene lukti kune kun la tutlanda popolo por efektivigi tiun grandan celon.

Huang Vej, Ven Kiang kaj Caj Hingsan faris paroladon dum la akcepto. Ili dankis Prezidanton Maŭ kaj la Komunistan Partion pro ilia edukado kaj la reformado al ili kaj partiajn kaj ŝtatajn gvidantojn pro ilia akceptado al ili. Ili diris: "En la pasinteco ni protektis la damnindan malnovan reĝimon, freneze oponis kontraŭ la Komunista Partio kaj la popolo kaj tiris Ĉinion en senelirejon. Niaj krimoj estas grandegaj. Hodiaŭ ni liberiĝis per speciala amnestio, akiris novan vivon kaj ekĝuis civitanecon kaj bonan prizorgon. Tio estas ebla nur en la socialisma Ĉinio gvidata de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio. Tio estas brila enkorpiĝo de la proletaj revoluciaj linio kaj politikoj de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Ni nepre ne forgesos la favoron de la Komunista Partio kaj decidis diligente lerni verkojn de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kaj la verkojn de Prezidanto Maŭ, serioze reformi la mondkoncepton, firme iri la socialisman vojon kaj dediĉi niajn fortojn al la socialisma konstruado kaj la unuigo de la patrolando."

Post la akceptado okazis festeno.




## MIKSA ELEKTRONIKA ANALOGA KOMPUTILO SUKCESE FABRIKITA

Sub la orientado de la principo de Prezidanto Maŭ — sendependeco kaj memdecido kaj sinapogo sur la propraj fortoj, la laboristoj, kadroj kaj teknikistoj de la Pekina Radioaparata Fabriko N-ro 1 mem projektis kaj sukcese fabrikis la unuan grandatipan miksan elektronikan analogan komputilon de tipo HMJ-200 en nia lando.

Miksa elektronika analoga komputilo estas nova speco de komputilo. Ĝi havas avantaĝojn de ambaŭ elektronika analoga komputilo kaj elektronika cifera komputilo kaj estas vaste aplikebla en scienca esploro, nacidefendo kaj aŭtomata regado. Tiu komputilo konsistas el du ĉefaj kaj 14 akcesoraj maŝinoj kaj el- kaj en-ira ekipaĵo, kaj ĝi havas entute 80 integrilojn kaj ĉirkaŭ 1,000 operaciajn amplifikatorojn. Ĉiuj akcesoraj maŝinoj povas funkcii memstare aŭ kune kun la aliaj. Tiu komputilo estas facile uzebla kaj altefika.

# Notoj pri la kunvenoj por liberigi militajn krimulojn per speciala amnestio

EN la 19-a de marto, la Plej Supera Popola Juĝejo liberigis 293 militajn krimulojn en diversaj lokoj per speciala amnestio.

En la solenaj kunvenejoj diverslokaj, portreto de Prezidanto Maŭ pendis super la podio, kaj ambaŭflanke de ĝi pendis la kvinstelaj ruĝaj flagoj. Kun emocio la militaj krimuloj en novaj vestoj eniris en la kunvenejojn. En la kunvenoj, senditoj de la Plej Supera Popola Juĝejo anoncis la nomliston de la militaj krimuloj liberigotaj per speciala amnestio kaj disdonis al ili informilon pri speciala amnestio kun oficiala stampo de la Plej Supera Popola Juĝejo de la Ĉina Popola Respubliko. Kiam la militaj krimuloj Huang Vej, Li Giusi, Ĉen Ŝiĝang, Van Bingjue, Liu Ĝenhiang, Song Kinghjuan, Ĝuang Cunfu, Ven Kiang, Ŝen Juncun, Ĝang Vejhan, Jue Ĝujuan k.a. akceptis la informilon, multaj el ili emociiĝis ĝis larmoj kaj en la kunvenejoj eksonis senĉese la sloganoj "Vivu la granda Komunista Partio de Ĉinio!" "Vivu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ!"

*Redono de deponitaj objektoj*



Antaŭe, de 1959 ĝis 1966, nia lando sesfoje sinsekve liberigis per speciala amnestio militajn krimulojn, inter kiuj estis Ajsin Ĝjoro Puji, Du Juming, Fan Hangie, Li Hianĝoŭ, Liaŭ Jaŭhiang, Vang Linggi, Caŭ Tiange, Fang Ging k.a., sume 296. Tiuj plus la nunaj 293 estas sume 589. Kaj nun, ĉiuj enkarceraj militaj krimuloj estas jam liberigitaj.

En la kunvenoj, la amnestiitaj militaj krimuloj parolis unu post alia por danki la grandan politikon de Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio, kiu havigis al ili novan vivon. La antaŭa generalo-leŭtenanto kaj komandanto de la 12-a Armea Grupo de Kuomintango Huang Vej diris emocie: "Klopodi por min reformi kaj akiri specialan amnestion estas mia deziro dum multaj jaroj. Aŭdinte la hodiaŭan anoncon de la speciala amnestio, mi estas senlime kuraĝigita kaj sentas senliman dankon. Mi decidas daŭre proksimiĝi al la popolo, fariĝi nova homo kaj dediĉi mian forton por la socialisma afero de la patrolando kaj por la liberigo de Tajvan-provinco." Por esprimi sian dankemon, li ankaŭ skribis versaĵon:

*Al mi l' Partio donis novan vivon kun favoro*
*Kaj indulgeme min reformis en novanimulon.*
*Pro tio mi decidis, kun dankeco en la koro,*
*La vivrestaĵon mian kontribui al popolo.*



*Ĉinaj partiaj kaj ŝtataj gvidantoj Je Gianjing, Hua Guofeng kaj Vu De akceptas la liberigitojn.*

En la kunvenoj, la amnestiitoj priparolis, kion ili akiris en la ideologia reformado kunlige kun sia propra travivaĵo. Ven Kiang, generalo-leŭtenanto kaj vicstabestro de la Antaŭenmarŝa Komandejo de la kuomintanga "Bandit-Eksterma Ĉefstabo" en Hjuĝoŭ kaj direktoro de la Norda Branĉo de la Esplora kaj Statistika Buroo de la kuomintanga Milita Konsilantaro, diris: "La krimoj antaŭe faritaj de ni al la popolo estas nekompenseblaj eĉ per dekmil mortpunoj al ni. Sed la reforma politiko de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ al militaj krimuloj savis nian vivon. Ĝi ne nur ne punmortigis nin kun indulgemo, sed eĉ donis ŝancon al ni por fari bonon anstataŭ malbonon por ke ni fariĝu novaj homoj. Dum la reformado, ni ricevis edukadon en politiko kaj zorgadon en medicino kaj vivo. Ĉio tio montris la grandan animon de la Kompartio por liberigi la homaron."

La antaŭa generalo-majoro kaj estro de la 118-a Divizio de Kuomintango Jin Ĝongjue multe dankis la popolan registaron pro ĝia zorgado pri li. Li diris: "Mi suferis katarakton kaj blindiĝis, sed post kvarfoja kuracado en hospitalo, mi reakiris vidkapablon. Sub la edifo de la politiko de Prezidanto Maŭ por reformi militajn krimulojn, mi ekvidis lumon kaj veron en la obskura kaj krima abismo." La antaŭa generalo-leŭtenanto kaj estro de la oficejo de la kuomintanga "Bandit-Eksterma Ĉefstabo" en Hjuĝoŭ Guo Jiju diris: "Mi estas milita krimulo kaj havis origine malfortan korpon. Oni opiniis ke mi vivos maksimume sesdek jarojn. Sed sub la zorgo de la Partio kaj la registaro, mi nun jam havas sepdek ok jarojn. Mi trifoje svenis pro gravaj malsanoj, kaj la popola registaro trifoje min enhospitaligis kaj savis. Sen la Kompartio kaj Prezidanto Maŭ, jam antaŭlonge ne estus mia vivo. Mi klopodos tutforte por aldoni brikojn kaj tegolojn en la socialisma konstruado."

Ĝuang Cunfu, la antaŭa generalo-leŭtenanto kaj ĉefkomandanto de la Paciga Ĉefstabo de Kuomintango en la Limregiono de Henan, Hubej kaj Anhuj, esprimis sian ekstreme grandan dankemon en sia parolado al la Partio kaj la popola registaro pri ties zorgo al liaj familianoj. Li diris kun larmoj: "Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio traktas nin militajn krimulojn kun revolucia humanismo kaj ne mortigis kaj punis niajn familianojn lasante ilin sekure vivi kaj labori spite al tio kiom grandaj estas niaj krimoj. Mi akiris la adreson de mia edzino dank' al la helpo de la popola registaro. Ŝi vivas sane kaj ĝuas laborasekuron eĉ post emeritiĝo. Ankaŭ miaj du filoj

havas laborojn. Kaj ĉifoje, la Partio kaj Prezidanto Maŭ indulgeme amnestiis min militan krimulon kaj donis al mi civitanecon. Pri tiuj favoroj mi neniam forgesos en la tuta vivo!"

En la kunvenoj, respondeculoj de la administrejoj de militaj krimuloj disdonis al la speciale amnestiitaj militaj krimuloj po kompleton da *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, kaj po 100 juanojn kiel poŝmonon kaj novajn vatitajn vestojn, uniformon, lanan litkovrilon, dikan puloveron, litkovrilon, littukon, kapkusenon, kapkusentukon, ĉapon k.a. vivbezonaĵojn. Tio multe kortuŝis ilin. Ili diris: "Tre zorgemaj estas la Kompartio kaj la popola registaro al ni. Por fari la vestojn, oni tajlis por ĉiu laŭ lia mezuro; se maljunulo perdis denton, oni instaligis al li artefaritan; kaj al miopuloj kaj hipermetropuloj oni donis necesajn okulvitrojn. Tia prizorgo restos por ĉiam en nia memoro."

Post la amnestio, la administrejoj de militaj krimuloj redonis al ili la deponitajn brakhorloĝon, vestojn kaj aliajn objektojn. La antaŭa generalo-leŭtenanto kaj vickomandanto de la 13-a Armea Grupo de Kuomintango Li Giusi diris emocie post ricevo de siaj objektoj: "La Komunista Partio faras ĉion serioze kaj senerare." Kiam ili revenis al la akceptejoj, ili ankoraŭ ne povis kvietigi sian emociitan koron. Iuj el ili notis la ĝojindan aferon sur sia taglibro, kaj aliaj prenis plumon kaj faris versaĵojn. Iu amnestiito ekscitiĝe skribis:

*Favoro de l' Partio altas pli ol la ĉielo,*
*al mi ĝi donas tute novan vivon ja hodiaŭ.*
*Mi ĉiam sekvos Prezidanton Maŭ, kaj multe faros*
*meritojn por sincere danki la Partion.*

Post la kunvenoj, diverslokaj registaroj kaj administrejoj de militaj krimuloj donis al ili simplan bankedon por adiaŭi ilin, en kiu la liberigitoj je speciala amnestio foje kaj refoje tostis por la nova vivo. Ili esprimis, ke ili nepre diligente studos verkojn de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kaj verkojn de Prezidanto Maŭ, daŭre reformos sian mondkoncepton kaj faros multon por la bono de la popolo.

MARTA zefiro de Pekino agrable anoncas la floradon de printempo. Pli ol 200 personoj liberigitaj sub speciala amnestio ĝoje venis al Pekino kaj enloĝiĝis en Kianmen-hotelo. Tuj post aranĝo de sia loĝado, iuj ekskribis leterojn kaj aliaj iris al poŝtatelegrafa servostacio en la teretaĝo por telegrame informi siajn familianojn pri sia ĝojinda liberiĝo sub speciala amnestio. En la lastaj tagoj, la edzino kaj gefiloj de iuj liberigitoj jam venis de Pekino aŭ aliaj lokoj al la hotelo por intervidiĝi. Ĉi sube mi notis kelkajn scenojn pri ilia ĝoja renkontiĝo.

## "NE SONĜO, SED REALO"

Huang Vej, kiu tute ne atendis, ke ankaŭ li povas esti inkludita en tiu ĉi speciala amnestio, interbabilis kun sia edzino Caj Ĵuoŝu sidante sur sofo. Li diris emocie: "Vere ĉio kvazaŭ en sonĝo!" Caj Ĵuoŝu lin korektis kun rideto: "Ne sonĝo, sed realo." Mon-

*Huang Vej (la dua de maldekstre en la fronto) kaj Du Juming (la kvara de dekstre en la fronto), membro de la Tutlanda Komitato de la Politika Interkonsiliĝa Konferenco k. a. promenas en la Somera Palaco.*



# Ĝoja renkontiĝo de la liberigitoj sub speciala amnestio kun siaj familianoj

trante sian edzinon, li diris al mi: "Ŝi ofte skribis al mi, ke mi bone min reformu."

Caj Ĵuoŝu estas 60-jara. Antaŭe ŝi laboris kiel oficistino en la Ŝanhaja Biblioteko kaj nun jam emeritiĝis. Informiĝinte pri la liberiĝo de Huang Vej, ŝi tuj venis al Pekino je la 20-a per aviadilo de Ŝanhajo. Ili havas 4 infanojn, el kiuj du laboras aliloke, la pli aĝa filino Huang Minnan laboras kiel instruistino en Kinghua-universitato kaj ilia pli juna filino iris labori en kampara komunumo de Gilin-provinco.

Huang Minnan kaj ŝia edzo Vu Joŭĝi venis tiutage kun sia fileto ĉ. 10-jara por vidi la gemaljunulojn. Huang Vej parolis pri sia danko al la Partio kaj la registaro kaj komprenaĵo akirita en politika lernado. Kaj li havas abundon da vortoj por paroli. Vu Joŭĝi diris, ke li studis radiokomunikadon kaj diplomite fariĝis instruisto en tiu universitato. Pli poste, por helpi lokan industrion, li venis al la Fabriko de Kuracaj Instrumentoj Dongfanghong en Pekino, kie nun li laboras kiel inĝeniero. Huang Vej demandis: "En sia raporto pri la laboro de la registaro al la Kvara Tutlanda Popola Kongreso, ĉefministro Ĝoŭ Enlaj elmetis grandiozan celaĵon por konstrui la nacian ekonomion. Kion faros via fabriko?" Kun plena memfido Vu Joŭĝi respondis: "Ni nun faras planon. La laboristoj de la fabriko estas levanta novan altan tajdon por forte teni la revolucion kaj stimuli la produktadon." Kaj Huang Vej kapjesis kun kontento.

## ILI KRESKAS SUB LA ZORGO DE LA REGISTARO

"Kiam mi disiĝis kun la infanoj en 1948, la plej aĝa Ŝang Bin estis nur 12-jara." Montrante la ĉeestantan mezaĝulon, Ŝang Ĉuandaŭ, antaŭe estro de kuomintanga Buroo de Civilaj Aferoj de Gilin-provinco kaj samtempe urbestro de Ĉangĉun, diris al mi: "Siatempe, mia plej juna filino estis nur unu-jara. Nun miaj ses gefiloj ĉiuj ricevis laborpostenon, geedziĝis kaj jam havas infanojn. Sub la kulturado de la Partio kaj registaro ili ĉiuj sane kreskis, kio ĝojigas mian tutan koron."

La plej aĝa fratino de Ŝang Bin laboras kiel teknikistino en la Tiangin-a Kemia Fabriko de Ĉiutagaj Bezonaĵoj, post diplomiĝo el la Tiangin-a Universitato; la plej juna fratino memvole iris labori en agrokultivejo en Hejlonggiang fininte sian studadon en supera mezlernejo; liaj ceteraj tri gefratoj fariĝis instruisto, ŝtallaminata laboristo kaj teknikisto post finstudo en pedagogia kolegio, metalurgia lernejo kaj agronomia teknika lernejo, respektive. Ŝang Bin diris: "Mi studis tek-

nologion kaj nun laboras kiel teknologiisto en la Dua Farmacia Fabriko en Pekino. Ĉiuj ni ses ricevis stipendion de la ŝtato dum nia lernado. Ni ĉiuj plenkreskiĝis dank' al la flegado kaj nutrado de la registaro kaj la laboranta popolo."

"Antaŭe mi ofte pensis," diris Ŝang Ĉuandaŭ rememorante sian pasintaĵon, "ke miaj gefiloj eble suferas diskriminacion kiel idoj de krimulo. Sed la fakto profunde edukis min, kiam en iu jaro, ĉiuj miaj infanoj venis vidi min kaj parolis pri sia vivo kaj progresado. Mia kvina infano supren faldis la manikon kaj diris montrante al mi sian varman puloveron: 'Paĉjo, tion ĉi donis al ni la ŝtato!' Tiam mi kortuŝiĝis tiel ke mi ne povis reteni miajn larmojn. Hodiaŭ, la infanoj ĉiuj ricevis laboron kaj vivas feliĉe. La bonkoreco de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio profunde gravuriĝis en mian koron kaj restos neforgesebla dum mia tuta vivo."

### "MI KORE DANKAS LA KOMUNISTAN PARTION KAJ PREZIDANTON MAŬ"


"Vi fariĝis inĝeniero, tion mi ja neniam imagis."

"Estas la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ, kiuj kulturis min en inĝenieron. Paĉjo liberiĝis hodiaŭ kaj komencis novan vivon, pro tio ankaŭ ni ĉiuj estas tre dankaj al la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ."

La supraj vortoj estas cititaj el la interparolo dum renkontiĝo en Pekino inter Liu Ĝenhiang, antaŭe generalo-leŭtenanto kaj estro de la kuomintanga 64-a Korpuso, kaj lia filo Liu Pejhian, inĝeniero de la Kemia Fabriko de Hingtaj.


Leginte la novaĵon el ĵurnaloj pri la amnestiiĝo de sia patro, Liu Pejhian speciale venis de Hingtaj al Pekino por vidi lin. La patro kaj filo kore interparolis en la hotelo pri siaj travivaĵoj en la pasintaj pli ol 20 jaroj kaj la nuna vivo. Liu Ĝenhiang informis sian filon pri la atingoj kaj komprenaĵoj en sia remuldado. Kaj la filo raportis al sia patro, ke li unue laboris en la Ŝtata Plana Komisiono post sia diplomiĝo el la kemi-industria fakultato de Ĝongŝan-universitato post la Liberiĝo. Kaj poste li eklaboris sur la nuna posteno kiel membro de la fabrika revolucia komitato kaj inĝeniero.

Liu Pejhian ĝoje raportis al sia patro: "Via bofilino estas diplomita el la Financa Kolegio



*Hu Ging-an kun siaj familianoj en Pekino*

*Li Giusi (la maldekstra) kun siaj edzino kaj filo en Pekino*



de Ŝanhajo kaj nun laboras en ŝtata institucio. Kaj vi jam havas tri nepojn el kiuj du lernas en elementa mezlernejo kaj la plej juna estas 6-jara. Paĉjo, vi certe tre ĝojos vidi vian bofilinon kaj nepojn." La 68-jara Liu Ĝenhiang ĝoje diris: "Vidante ke vi jam fariĝis utila homo por la popolo sub la edukado de la Komunista Partio, mi kore dankas la Partion kaj Prezidanton Maŭ!"

### "LA 19-A DE MARTO ESTAS MIA 'NOVA NASKIĜTAGO' "

"Paĉjo, ni ĉiuj ĝojas pro vi."

"Ho jes, Prezidanto Maŭ, la Komunista Partio kaj la popola registaro havigis al mi la duan vivon. La 19-an de marto mi prenos kiel mian novan naskiĝtagon, neforgeseblan por mi dum la tuta vivo, ĉar de tiu dato komenciĝis mia nova vivo." Tiel interparolis Hu Ging-an, antaŭa generalo-leŭtenanto kaj membro de la Plana Komitato de la Buroo de Sekreta Informo de la Nacidefenda Ministerio de Kuomintango, kaj lia filino Hu Baŭĝen.

Hu Baŭĝen kaj ŝia fratino Hu Baŭlin ambaŭ laboras kiel aktorinoj en la Ensemblo de Ĉina Karbominejo. "De pli ol 20 jaroj," diris Hu Baŭĝen, "la Partio kaj la popola registaro atenteme prizorgis nin sen preterlaso de iu ajn detalo. Mia fratino eklaboris en sia 14-jara aĝo kaj mi en la 13-jara. Ĉio nia estas donita de la Partio. Mia fratino amas sin okupi pri verkado kaj reĝisorado de dancoj, kaj sub la plenforta kulturado de la superuloj, ŝi progresis tre rapide kaj sukcesis verki kaj reĝisori la kantodancojn 'Kanto de Batalo sur la Suda Maro' k. a."

"Ĉion tion ni ŝuldas al la prizorgo de la Komunista Partio kaj la popola registaro," diris Hu Ging-an kun emocio. "El leteroj de miaj familianoj mi informiĝis, ke mia filo Hu Nankaj ricevis laborpostenon de projektisto en Anhuj-provinco post sia diplomiĝo en la Belarta Kolegio de Centra-Suda Ĉinio. Fotojn pri prezentado de miaj du filinoj mi konservas ĉe mi ĝis nun. Mia plej juna filo nun loĝas en Ŝanhajo. Mia maljunulino Jan Ŝuming antaŭe estis instruistino kaj poste fariĝis laboristino, nun jam emeritiĝis kaj ricevas pension ĉiumonate. Mi neniam povis imagi al mi ĉi tion entute. Mi neniam forgesos la favoron de Prezidanto Maŭ. Mi klopodos lerni konscience por fari ion utilan por la popolo dum la resta parto de mia vivo."




# LA DAHUROJ

de ZONG MIN

LA dahuroj, kiuj formas unu el la naciecoj de Ĉinio, havas longan historion kaj nombras 55,000 personojn. Ili loĝas ĉefe en la Morin-Dava-a Dahura Aŭtonoma Flago* kaj en la ĉirkaŭurbo de Ĉiĉihar, parte en Fuju, Longgiang, Nengiang, Nehe, Ajhuj, Hulun-Bojr-ligo de Hejlonggiang kaj en Taĉeng de Hingiang.

La dahura lingvo apartenas al la mongola lingvogrupo de la altaja familio. Pro intima interrilatiĝo kun hanoj, mongoloj, ovenkeoj kaj kazaĥoj dum longa tempo, multaj dahuroj scias ankaŭ tiujn lingvojn.

Autaŭ la 17-a jarcento, la dahuroj loĝis sur la norda bordo de la meza kaj supra partoj de Hejlong-rivero. Ili ĉefe okupiĝis pri terkulturo kaj bestobredado kaj samtempe ankaŭ pri fiŝado kaj ĉasado. En la jaro 1643, la cara Rusio etendis siajn agresajn ungojn en la nordorientajn limregionojn de nia lando kaj ĝiaj invadaj trupoj estrataj de V.D. Pojarkov kaj J.P. Ĥabarov entrudiĝis en regionojn loĝatajn de dahuroj kaj aliaj popoloj. La invadintoj furioze atakis vilaĝojn de dahuroj, ovenkeoj kaj mongoloj, ne nur prirabis kaj masakris la loĝantojn kaj bruligis iliajn domojn, sed eĉ manĝis homan karnon. Ĉar tiam la loĝregionoj de dahuroj estis ĉefa grenproduktejo, tial ili fariĝis la ĉefa objekto de prirabado de la invadintaj bandoj. Vizaĝe al la agreso, la dahuroj plenaj de malamego leviĝis al batalo kune kun ovenkeoj, mongoloj kaj alinaciecaj popolanoj, solide draŝis per primitivaj armiloj la kanibalojn armitajn per modernaj armiloj kaj forte rebatis la ekspansian politikon de la cara Rusio. Post la Opia Milito en 1840, Ĉinio fariĝis paŝon post paŝo duonkolonia kaj duonfeŭda socio, sub la agresado de imperiismo. La loĝregionojn de dahuroj plej frue invadis la cara Rusio. Post la malvenko de Rusio en la Japana-Rusa Milito en 1904, la fortoj de la cara Rusio retiriĝis el la Nordoriento de nia lando kaj tiam ilin tuj anstataŭis japanaj agresaj fortoj. La duobla subpremado de imperiismo kaj feŭdismo pelis la dahurojn en pezajn mizerojn. Ekde 1644 sub peza premado la dahuroj devis migri suden al la bordoj de Nengiang kaj ĝiaj branĉoj.

La dahuroj, kiuj kuraĝe kaj lerte batalis en la historio, estis ofte mobilizitaj de la regantoj de King-dinastio por gardi landlimajn pasejojn, tiel ke tiuj senditoj ekloĝis en Ajhuj, Hulun-Bojr kaj Hingiang. Tio kaŭzis ilian nunan dislokitecon.

Antaŭ la Liberiĝo, la plejparto de ili sin okupis pri terkulturo, iuj samtempe ankaŭ pri brutobredado, kaj nur malgranda parto de ili loĝantaj en la Ovenkea Aŭtonoma Flago okupiĝis ekskluzive pri brutobredado. Ĉasado estas la grava okupiĝo de la dahuroj, kiuj loĝas en la montregiono de la norda parto de la Morin-Dava-a Dahura Aŭtonoma Flago. Sub la influo de la lokaj kondiĉoj ankaŭ arbohakado kaj produkto de lignokarbo iam prosperis en montregiono loĝata de dahuroj. Laŭ la malsamaj naturaj kondiĉoj la dahuroj loĝantaj en diversaj lokoj ankaŭ entreprenas transportadon, fiŝadon kaj produktadon de orelfungo kaj brulligno kiel flankokupojn. Ĉar la lignaj ĉaroj konstruitaj de dahuroj estas malpezaj, ili taŭgas precipe en regiono montoza aŭ marĉoza. La pipoj skulptitaj de dahuroj kun elegantaj inkrustaĵoj el korno kaj bestaj ostoj estas speco de belega metiartaĵo.

Multaj dahuroj loĝantaj en montregiono tre lertas en tanado de ledo kaj de ili tanitaj ledoj de kapreolo aŭ cervo estas tre molaj. La agrokulturo de tiu popolo estis relative disvolviĝinta, sed antaŭ la Liberiĝo la terposedo estis tre malegala inter ili, ekzemple, la kvin familioj de bienuloj kaj kulakoj de Habukivilaĝo en la Morin-Dava-a Dahura Aŭtonoma Flago posedis 44.6% de la agroj de la tuta vilaĝo, dum la 51 familioj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj posedis nur 23.2%

Post la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito en aŭgusto de 1945, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio la diversnacieca popolo en nordorienta Ĉinio liberiĝis. Post la Liberiĝo, demokratia kaj socialisma reformoj estis plenumitaj en la regionoj loĝataj de la dahuroj. Je la 15-a de aŭgusto, 1958, fondiĝis la Morin-Dava-a Dahura Aŭtonoma Flago, per kio la rajtoj de nacimalplimultoj kiel memdecidaj mastroj estas plene realigitaj. Sub la brilo de la nacia politiko de la Partio rapide kreskis nacimalplimultaj kadroj, kaj nun pli ol duono de la kadroj en la diversnivelaj organoj de la nomita aŭtonoma flago estas dahuroj aŭ membroj de aliaj nacimalplimultoj.

La praktiko de la aŭtonoma politiko en nacimalplimultaj areoj forte akcelis la disvolvon de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado en la dahuraj regionoj. Sub la direktado de la politiko "fari multflankan entreprenadon de brutobredado, forstokulturado k.a. kun agrikulturo kiel la ĉefa tasko", la dahura popolo disvolvis ardajn amasajn movadojn de "lernado de Daĝaj en agrikulturo" kaj "lernado de Daking en industrio", tiel ke rapide disvolviĝis ĝiaj agrikulturo, bestobredado kaj industrio. En 1973 la totala produktokvanto de greno de la Morin-Dava-a Dahura Aŭtonoma Flago preskaŭ duobliĝis kompare kun tiu en la tempo de ĝia fondiĝo. La plejparto de la produktaj brigadoj ne nur ĉesis suferi malsufiĉon de greno por nutri sin sed ankaŭ havas superfluan kvanton por vendi al la ŝtato. La totala nombro de la brutoj bre-



*Dahura danco*

dataj de la dahuraj paŝtistoj de Bajantohajvilaĝo de la Ovenkea Aŭtonoma Flago kreskis en 1973 naŭoble kompare kun tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo. Hing-anmontaro estas unu el la plej grandaj bazoj de praarbaroj de nia lando. En la baseno de la rivero Nengiang ĉe la suda piedo de tiu montaro troviĝas multaj naturaj arbaroj. La tieaj dahuroj faris grandan kontribuon por la disvolvado de tiea forstokulturo. En la dahuraj regionoj fondiĝis ankaŭ multaj malgrandaj industriaj entreprenoj servantaj al agrokulturo. Nun la ĉefurbo de la flago kaj ĉiuj komunumoj estas interligataj per ŝoseoj kaj ĉiuj vilaĝoj jam uzas elektron.

De pli ol 20 jaroj sekve de rapida disvolviĝo de la produktado la vivnivelo de la dahura popolo multe altiĝis. Multaj familioj posedas biciklon, kudromaŝinon, radioricevilon kaj brakhorloĝon. Antaŭ la Liberiĝo, en la areo de la nuna Morin-Dava-a Dahura Aŭtonoma Flago estis nur unu agronomia lernejo kaj dekkelkaj elementaj lernejoj. Nun tie jam funkcias 24 mezlernejoj kaj krome ĉiu vilaĝo havas sian elementan lernejon. Sanprotektaj institucioj estas starigitaj tie. La flago havas hospitalon, la komunumoj havas kuracajn staciojn, la produktaj brigadoj starigis sistemon de koopera kuracado kaj nudpiedaj ku-

NOVA ESPERANTA BILDRAKONTO EL ĈINIO

**SAĜA KAPTO DE GRANDA HUZO** (88 Es-120)

Nova infanlibreto el 34 ĉinstilaj koloraj bildoj kun mallongaj klarigoj formantaj interesan rakonton en simpla lingvo facile komprenebla por komencantoj, estas bona legaĵo, precipe por niaj esperantistoj junaĝaj.

36 paĝoj en formato 18 × 20.8 cm.
prezo: £ 0.08 US$ 0.20




NOVA SERIO DE BILDKARTOJ

**Metiartaĵoj de Ĉinio** (87 Sa. G. Es-202)

El 12 bele presitaj koloraj bildoj pri ebura, jada, ŝtona skulptaĵoj, klozoneaĵo, porcelanaĵo, fajencaĵo, bambua plektaĵo kaj ambaŭflanka brodaĵo, ĉiuj kun tipa ĉina stilo kaj esperanta klarigo.

Prezo: £ 0.12 US$ 0.30

Eldoninto: Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio

**Distribuanto: GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj)**

Mendu ĉe niaj lokaj perantoj aŭ rekte ĉe la Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN, P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.


racistoj donas necesan medicinan helpon al la pacientoj en iliaj hejmoj.


La tradiciaj kulturo kaj arto de la dahuroj havas sian apartan stilon. Iliaj popolkantoj karakteriziĝas per alta tono, ilia hambodanco per klaraj taktoj kaj energiaj movoj kaj iliaj gravuraĵoj, desegnaĵoj, brodaĵoj kaj papertonditaj bildoj estas tre delikataj kaj belaj. Hodiaŭ la dahuraj revoluciaj literaturo kaj arto estas plie saturitaj per socialisma enhavo.

---

* *Flago estas administra unuo egala al gubernio.*

# Kien la fraĉjo?

**Pentrita de Guoliang**



*Sur la kovrilo:*

En parko okaze de la Unua de Majo




# EL POPOLA ĈINIO 中国报道

**Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO**
**P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio**

**Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio**

**N-ro 7 (204) 1975**


## Ĉefa Enhavo


Ni restos ĉiam kune . . . . . . . . . . . . . 1

Iri la vojon de sinapogo sur propraj fortoj . . . . . 3

La ŝanhaja haveno en antaŭenmarŝo . . . . . . . 8

Nova vojo de produktado de trikitaj lanvestoj . . 13

En daŭrigo de la revolucio . . . . . . . . . 15

Nova revolucia generacio . . . . . . . . . . 19

Novajn kantojn el Ĉangbaj-montaro . . . . . . . 23

Ĉinio liberigis militajn krimulojn per speciala amnestio 26

Notoj pri la kunvenoj por liberigi militajn krimulojn per speciala amnestio . . . . . . . . . . . 30

Ĝoja renkontiĝo de la liberigitoj sub speciala amnestio kun siaj familianoj . . . . . . . . . . . . 33

La dahuroj . . . . . . . . . . . . . . . 36

# Brila Venko de la Armeo kaj Popolo de Kamboĝo



La bravaj Naciliberigaj Popolaj Armitaj Fortoj de Kamboĝo kreskas en batalado.



Soldatinoj de la Naciliberigaj Popolaj Armitaj Fortoj de Kamboĝo sur la fronto de Pnompeno


La popolanoj de la liberigitaj regionoj de Kamboĝo aktive disvolvas agrikulturan produktadon por subteni la fronton.





Komandantoj de la pnompena fronta komandejo de la popolaj armitaj fortoj studas la situacion de la batalkampo.

Pnompenaj studentoj manifestacias kontraŭ la naciperfida kliko de Lon Nol.





Kamboĝaj popolanoj varme bonvenigas la batalantojn de sia naciliberiga armeo.




Batalantoj de la popolaj armitaj fortoj en patrolado sur strato de Pnompeno



Post la liberigo de Pnompeno, batalantoj de la popolaj armitaj fortoj gardas sur la domo de la pupa Ministerio de Nacidefendo.

Parto de la trofeo sur la batalkampo de Pnompeno





Kanonoj de la pupa armeo preditaj en liberigado de Pnompeno




Batalantoj de la popolaj armitaj fortoj gardas la aerodromon Pochentong.



Soldatoj de la frakasita pupa armeo de Lon Nol forfuĝas en paniko.

Detruita petrolŝipo de la pupa armeo de Lon Nol en flamoj sur Mekongo





Panike rifuĝantaj puparmeanoj de Lon Nol dum bombardado al la aerodromo Pochentong



Parto de Jujuan-bazaro



Butiko de ludiloj

# La Urbopatrona Templo Hieraŭ kaj Hodiaŭ

La Malnova Urbopatrona Templo de Ŝanhajo estis konstruita meze de la deknaŭa jarcento kaj jam havas historion de pli ol cent jaroj. En la komenca periodo ĝi estis loko por disvastigi feŭdajn superstiĉojn kaj dum la reakcia regado de Kuomintango ĝi fariĝis loko, kie friponoj tiranis, ĉantaĝis kaj faris ĉiajn malbonojn. Ĝi estis miniaturo de la malnova Ŝanhajo.

Post la Liberiĝo, ŝanĝiĝis Ŝanhajo kaj radikale ŝanĝiĝas ankaŭ la Malnova Urbopatrona Templo. La malordaj kaj kadukaj butikoj kaj malnovaj stratoj ĉirkaŭ la Templo estis riparitaj aŭ rekonstruitaj. Nun la novaj larĝaj kaj puraj stratoj kun siaj bonordaj butikoj formis grandan komercan kvartalon de ĉiaj vivbezonaĵoj kaj ĝi ricevis la novan nomon Jujuan-bazaro. Tiu bazaro enhavas ĉ. cent butikojn kiuj vendas diversajn produktaĵojn, ĉiutagajn bezonaĵojn, metiartaĵojn kaj diversajn manĝaĵojn el diversaj lokoj de la tuta lando.

La parko Jujuan de tiu kvartalo estas unu el la fame konataj parkoj en suda Ĉinio. Ĝi renomiĝis ne nur pro siaj elegantaj konstruaĵoj kaj bele aranĝita pejzaĝo, sed ankaŭ pro tio ke ĝi estas memorinda loko pri la revolucia armita batalo de la ŝanhaja popolo kontraŭ imperiisma agreso kaj la feŭda regado de King-dinastio. Dianĉun-salono en tiu parko estis la norda komandejo de la Glaveta Asocio de Ŝanhajo kiam ĝi faris armitan leviĝon en 1853 responde al la Revolucio de Ĉielpaca Regno. Nun ĝi havas novan aspekton post rekonstruado.

Sur la dorskovrilo:
Kiosko en lago de la parko

Vidindaĵo en Jujuan



